1987 aprilo
80a jaro
n-ro 976 (4)
aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

Polski Związek Esperantystów
Oddział w Warszawie
ul. [illegible], 00-01[illegible] Warszawa
tel. 26-22-19

ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — 3015 bj rotterdam — nederlando





Kiel instrui Esperanton

al la mondo?

Polski Związek Esperantystów
Oddział w W...
ul. Jasna 6, 00-013 ...awa
tel. 26-22-10

Vi trovos

numeron pli tradician ol la lasta, kun ĉiuj rubrikoj en la kutimaj lokoj. Tio espereble ne implicas, ke ĝi estas malpli interesa! Laŭ viaj leteroj, niaj ĉiamaj rubrikoj — Loke—Fake—Persone, Anoncetoj ktp — estas ĉiamaj ĝuste pro sia populareco. Eĉ Oficiala Informilo havas sian legantaron! Mi do kuraĝas esperi, ke la libroamantoj inter vi ĝoje plonĝos en la profundojn de Laste aperis, aŭ vados kun kontento tra la analizo pri la pasintjara vendostatistiko. Kaj se vi jam havas unu libron, kiel iu esperantisto en *Ombro sur interna pejzaĝo*? Nu, eble foja lego de recenzo tentos vin duobligi vian bibliotekon! Bonan trarubrikumadon — ĝis la maja...

Enhavo

61 Instruado de Esperanto: Rimarkinda progreso, sed mankas efika kunlaboro (Germain Pirlot)
62 Instruada metodiko: Sep subjektivaj asertoj pri fremdlingva instruado (T. Dahlenburg)
63 Estrara kunsido: Ĝis kvin minutoj post la noktomezo
64 Freinet-metodo kaj Esperanto: Ekkoni la mondon per internacia korespondado (Luiza Marin)
66 Landa agado: Jubilea kongreso kaptas atenton en Hungario (Vilmos Benczik)
68 Informado: Post cent jaroj, for la profetaĵojn! (Vaŭn Fraŭsing)
69 Konkurso
70 Radio Polonia en la jaro 1987
Koresponda Servo Mondskala: Kvante rekorda, kvalite plibonigenda (R. Llorens)
71 Kio pleje vendiĝis en 1986?
72 Reagoj: Lingvo ne nur por kleruloj (K. Riemersma); Pri blufoj kaj fanfaronoj (Aldo de'Giorgi); Esperanto kaj la angla: Dek tezoj por diskuti (Stefan Maul)
73 Recenzoj: *Diskurso pri la metodo* de Kartezio (Nikola Rašić); *Dilemoj de la nuntempo — vide el Hungario,* red. Sándor Révész (Werner Bormann); *Viro en nigra mantelo kaj aliaj rakontoj* de Barbara Sokolówna (Gerrit Berveling)
75 Kongresa Komuniko de la 72a UK en Varsovio
76 Felice Bertoletti forlasis nin (Nicola Minnaja)
77 Laste aperis...
78 Loke—Fake—Persone
80 Anoncetoj

La kovrilo

starigas demandon jam cent jarojn aĝan kaj ankoraŭ tiel malfacilan, kiel en 1887. Kiel ni respondu, ekzemple, pri filipinaj infanoj, sovetiaj studentoj, triamondaj plenkreskuloj...? Eble unue ni provu respondi eĉ pli tiklan demandon: *kial* ili lernu Esperanton? Lingvolernado ja bezonas fortan motivon kaj konkretan celon, kiel emfazas ĉiuj tri fakaj kontribuantaj al ĉi tiu numero. Kaj ne nur ili — pluraj aliaj tuŝas la saman problemon, ĉu en la rolo de korespondado, la maniero propagandi, la ŝancoj de Esperanto kontraŭ la angla. Eble vi ne konsentos kun ĉiuj opinioj esprimitaj ĉi tie — ankaŭ mi ne! Se tiel... nu, mi atendas viajn reagojn...

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.
Telefono: (010) 436 10 44 kaj 436 15 39.
Telekso: 23721 UEA NL; **Telegramadreso:** ESPERANTO ROTTERDAM.

Aperas monate (escepte de aŭgusto).
Fondita en 1905 de M.P. Berthelot (1881-1910). **Legata en 105 landoj.** Voĉlegata por blinduloj.
Redaktoro: Mark Fettes.
Abonprezo varias laŭlande (gld. 44,50; US $ 21; GM 39; enoj 3300 ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-supra adreso. Unuopa ekzemplero kostas 4,00 guldenojn.
Anonctarifo (gld.): 1 p. 1 400, 1/2 p. 740, 1/4 p. 400, 1/8 p. 240, 1/16 p.150. Instancoj kaj entreprenoj de la Esperanto-movado rajtas rabaton de 50%. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.
Banko: Bank Mees & Hope, Postbus 749, NL-3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804).
Ned. poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Estraro de UEA

Prezidanto (planado, Jubileo): d-ro Humphrey Tonkin, Office of the President, State University College, Potsdam, NY 13676, Usono; tel. (315) 265-6744.
Vicprezidanto (gvidas eksteran agadon): s-ro Grégoire Maertens, Prins Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; tel. (50) 35 49 35.
Vicprezidanto (interna kaj ekstera agadoj): s-ro Yosimi Umeda, 2-15-10 Aobadai, Meguro-ku, Tôkyô, 153, Japanio; tel. (3) 770 64 86.
Ĝenerala sekretario (interna agado): d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u 5/b VII.22, H-7624 Pécs, Hungario; tel. (72) 23 274.
Estrarano (ekstera agado): d-rino Barbara Despiney, 21 rue des Cuverons, F-92220 Bagneux, Francio; tel. (1) 46 65 22 16.
Estrarano (ekstera agado): prof. d-ro Ottó Haszpra, Rosenberg házaspár u. 5, H-1054 Budapest, Hung.: tel. (1) 316-423.
Estrarano (interna agado): s-ro Diccon Masterman, "Quasi in Cima", Via di Cecina 610, I-55029 S. Stefano di Moriano (LU), Italio; tel. (583) 570 66.
Estrarano (gvidas la fakon pri financo): d-ro Victor Sadler, Livingstonelaan 304, NL-3526 HW Utrecht, Nederlando; tel. (30) 88 68 37.
Estrarano (gvidas internan agadon): s-ro Jean-Louis Texier, 27 chemin des Carreaux, Cerny, F-91590 La Ferté Alais, Francio; tel. (1) 64 57 66 53.

Maandelijks tijdschrift "Esperanto", nr 976 (4), april 1987. Verantwoordelijke uitgever: G. Maertens, Prins Leopoldstraat 51, B-8310 Brugge.

Rimarkinda progreso, sed mankas efika kunlaboro

En antaŭparolo, kiun li skribis por la 6a eldono de mia broŝuro pri la instruado de Esperanto, prof. I. Szerdahely, prezidanto de ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj), substrekas i.a. ke "en la nuna mondo ne plu sufiĉas la sloganoj; oni postulas konkretajn faktojn." Li plue ripetas proponon de prof. M. Duc Goninaz, kiu, en sia antaŭparolo por la 3a eldono en 1982, jam rimarkigis ke "ni nepre bezonas interŝanĝon de informoj pri la konkretaj cirkonstancoj de la instruado, pri la metodologio, la programoj, la enhavo, la ekzamenoj k.s."

Ĉu multaj gvidantoj de Esperanto-kursoj samopinias? Ni rajtas dubi pri tio! Estas ege malfacile kompili fidindajn informojn pri la oficiala instruado de nia "kara lingvo" en la lernejoj, eĉ je supera nivelo, t[illegible]en universitatoj kaj samgradaj institutoj. Malgraŭ la legenda bonvolo, kiu ŝvebus en Esperantujo, respondas apenaŭ 50% el kontaktitaj kursgvidantoj kaj supozitaj informontoj.

Okaze de miaj enketoj, pluraj kolegoj bedaŭris mankon de interligilo, kiu ebligus diverscelajn rilatojn inter universitatoj el landoj kie Esperanto estas oficiale instruata; pluraj plendas ankaŭ pri manko de moderna kaj taŭga kursmaterialo, kaj finna kolegino eĉ sugestis fondon de internacia centro pri instrumaterialo. Fakte la nova estraro de ILEI intencas atenti pri tiuj gravaj mankoj kaj klopodi neniigi ilin per konkreta, realisma agado. Ni esperu!



Disvolviĝo de Esperanto-instruado en la mondo. Grafikaĵo el Pirlot, 1986. ● = nombro da superaj kursoj; □ = nombro da landoj.

Tamen, la situacio estas sufiĉe kontentiga kaj la progreso rimarkinda, precipe dum la lasta jardeko. Laŭ *Esperanto en perspektivo,* en 1970 estis oficialaj kursoj en 30 superaj lernejoj de 15 landoj. Ekde 1980 tiuj ciferoj rapide kreskis kaj ili estis respektive en 1981, 56 kaj 15; en 1983, 79 kaj 17; en 1984, 109 kaj 22; en junio 1986, 125 kaj 28. Eĉ se ni ne blinde fidu ilin, tiuj ciferoj pli-malpli bone spegulas situacion kiu daŭre ŝanĝiĝas ĉiumonate.

Nuntempe ni povas diri ke Esperanto estas oficiale instruata je supera nivelo en ĉiu kontinento. Je la komenco de 1986, la dispartigo estis jena: Eŭropo, 16 landoj kaj 58 lernejoj; Azio, 4 landoj kaj 40 lernejoj; Ameriko, 6 landoj kaj 25 lernejoj; Afriko, Oceanio, po 1 lando kaj 1 lernejo. Ĝenerale, dum tiuj kursoj Esperanto estas lernata kiel elektebla, nedeviga fako; kelkloke ĝi jam estas samrajta kun aliaj fremdlingvoj. Ĝia instruado povas esti organizita dum unu ĝis tri, eĉ kvin jaroj; laŭ unu ĝis tri niveloj; kun aŭ sen poent(unu)oj; kun aŭ sen ekzamenoj; kun diplomo, atestilo aŭ simpla mencio en la studentkajero.

Laŭ mia opinio, bazita sur komentoj kiujn mi ricevis dum tiuj ses enketoj, ankoraŭ tro da Esperanto-kursoj estas sencelaj: oni kontentiĝas instrui lingvon sen antaŭvidi postan aplikadon, des pli ke, bedaŭrinde, nia "kara lingvo" ne multe allogas hodiaŭ. Kial? Eble ĉar "realismo" restas tro ofte "eksterlandaĵo" en Esperantujo. Ni kuraĝu ne nur konstati tiun situacion, sed ĉefe klopodi eliri el ĝi. Kiel? Eble, kaj i.a., laŭ tiu sugesto de pola profesoro, kiu ĵus faris staĝon en usonaj universitatoj: "Ni troviĝas kvazaŭ en fermita cirklo. La faka uzo de Esperanto ne estas grandskala; por pligrandigi ĝin ni devas allogi al Esperanto pli da fakuloj. Sed, kiel argumenti se la faka aplikado de nia lingvo estas tiom malgranda? Ni eliru el ĝi spiralforme, paŝon post paŝo, instruante la lingvon kaj aplikante ĝin en fakaj medioj."

Dum la jubilea jaro ni festos la jarcenton de Esperanto, kompreneble, sed ni devus kapti tiun okazon por ĝisfunde analizi la veran situacion de la instruado de nia lingvo, por fari tre seriozan bilancon kaj onte pli efike pluagadi. En sia Rezolucio de 1985, Unesko eksplicite "invitas la ŝtatojn instigi al la enkonduko de studprogramo pri la lingvo-problemoj kaj pri Esperanto en lernejojn kaj instituciojn de supera edukado", sed ne eblos konkretigi tiujn vortojn se, samtempe, ne eblas profesie utiligi tiun lingvon en la plej diversaj medioj. Laŭ mi, la Esperantomovado estas kiel aŭtomobilo, kies radoj estas informiĝo , informado, instruado kaj aplikado; vole

nevole la kvar radoj glate funkciu samtempe, — se ne, la veturilo ne kapablas antaŭeniri. Prioritate ni prizorgu la funkciadon de tiuj radoj kaj poste ni havos tempon por kvereli pri la koloro de la sidiloj.

Germain Pirlot

Aluditaj verkoj:

- G. Pirlot, *Oficiala situacio de la Esperanto-instruado en la mondo,* 6a eld., Oostende, junio 1986, 23p. (aperis ankaŭ en la serio E-Dokumentoj). Pli fruaj eldonoj aperis en jan. 1982 (3a), dec. 1983 (4a), dec. 1984 (5a).
- I. Lapenna, U. Lins, T. Carlevaro, *Esperanto en perspektivo,* UEA/CED, London-Rotterdam, 1974, pp. 103-108.

INSTRUADA METODIKO

Sep subjektivaj asertoj pri fremdlingva instruado

Ĉu hazarda koincido aŭ internidea kohereco? Ĵus mi fintrafoliumis la januaran numeron de *Esperanto,* kiam la poŝtisto enmanigis al mi leteron de la nova redaktoro: bonvolu surpaperigi kelkajn viajn pensojn pri la temo "instruado de Esperanto"! Kaj mi ricevis lian peton, kiam mi estis sidanta ĉe mia skribtablo kaj estis pripensanta mian specialan kontribuon por la 5-a Internacia Metodika Seminario, kiu en aprilo okazos en Bulgario.

Jes, mi kun plezuro esprimas en nia revuo kelkajn konvinkojn de mi, kiuj rilatas al la instruado de fremdaj lingvoj ĝenerale kun aparta konsidero de Esperanto. Ĉi tiuj starpunktoj de mi reliefiĝis dum mia preskaŭ tridekjara praktika laboro kiel instruisto kaj speciale dum la ĝisnunaj kvar Internaciaj Metodikaj Seminarioj en Pollando, Hungario kaj GDR. Mi dankas sinjoron Fettes pro liaj vortoj: "Objektiveco kompreneble ne estas nepra kondiĉo!" Kaj nun subtenu min aŭ kontraŭbatalu min, se mi asertas:

1. La instruado de iu ajn fremda lingvo ne limiĝu je transdono de lingva materialo kaj je evoluigo de la kvar fundamentaj kapabloj (aŭskultante kompreni; legante kompreni; paroli; skribi), sed *samtempe* progresigu humanajn pensmanierojn ĉe la lernantoj kaj pliriĉigu ilin sur ĝeneralklereca kampo (sciindaĵoj rilate al historio, beletro, geografio, artoj ktp).

2. Dum la instruado de difinita etna fremda lingvo, oni ne tro emfazu la signifon de tiu lingvo en la mondo, ĉar tiamaniere atingatas nur supraĵa, utilisma motiveco koncerne la okupiĝon pri lingvoj. Inverse — oni klopodu kiel instruisto utiligi fremdan lingvon por malfermi la okulojn, ke la mondo konsistas kaj konsistos el multnombraj pensmanieroj, el tre multaj kaj principe egalrajtaj lingvoj.

3. Kiel unuan fremdan lingvon oni elektu lingvon, kiu jam ekde la komenco de la lernado postulas de la lernantoj kaj flanke de la instruantoj grandan kvanton de atento, malfacilaĵoj en la alproprigprocedo, por ke kresku ĉe la homoj la kompreno, ke lingvo estas vere komplika socia fenomeno.

Esperanto kiel unua fremda lingvo estas taŭga nur por popoloj, kies gepatra lingvo esence diverĝas de la strukturo kaj vortaro de Esperanto; pro tio — kiel dirite, laŭ mia subjektiva konvinko — Esperanto ne estas fruktodona "propedeŭtikilo" por germanlingvanoj, sed ĝi povas esti favora ponto ekzemple por hungaroj, japanoj, ĉinoj.

4. La instruisto de Esperanto devas, se li instruas tiun ĉi fremdan lingvon al homoj, kiuj relative rapide povas enprofundiĝi en ĝian strukturon kaj vortmaterialon, pli amplekse prepari sin al la unuopaj instruhoroj ol instruisto de etna fremda lingvo. Kial? Ĉar en etnaj fremdaj lingvoj vi ĉiam trovas ebleco kaj neceson, montri dum la instruhoro ilian regulecon kaj la t.n. eksterregulaĵojn — sed en la instruado de Esperanto, pro ĝia relative granda gramatika konsekvenceco la instruisto urĝe bezonas novajn enhavojn, per kiuj li povas interesigi la ĉeestantojn apliki la lingvon en ĉiam novaj situacioj.

5. Esperanto-kursoj devus daŭri tiel longe kiel aliaj fremdlingvaj kursoj, ĉar nur tiel ni povus konvinki la neesperantistaron, ke la atingitaj rezultoj en la alproprigo de Esperanto estas reale multe pli altaj ol en kompareblaj fremdlingvaj kursoj: *la kvalito en la uzado de la lingvo sur la plej diversaj temokampoj estu alcelinda!* Ni kiel gvidantoj aŭ metodikistoj de Esperanto-alproprigado orientiĝu je la naciaj programoj, kiuj validas por la kvalifiko de lernejanoj, studentoj, interpretistoj, tradukistoj, kaj kreu programojn kun la sama laŭtema enhavo!

21a Konferenco de ILEI

(Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj)

16a-24a de julio 1987
Lodza Universitato, Pollando

La Konferenco estas aparte grava pro la decidoj, kiujn faros la partoprenantoj rilate diversajn kursojn, ekzamenojn, atestilojn kaj diplomojn. Precipe temas pri ĉiuj rajtigaj kaj perfektigaj aranĝoj por Esperanto-instruistoj. Krome, la kadrotemo ***La scienca esploro de Esperanto el pedagogia, didaktika kaj lingvopolitika vidpunktoj*** *promesas viglajn kaj altnivelajn diskutojn, kiaj nepre necesas por plialtigi la ĝeneralan nivelon de Esperanto-instruado kaj por profesiigi por-Esperantan laboron.*

Pro tio, la Estraro de ILEI insiste alvokas ĉiujn instruistojn, partopreni multnombre la konferencon — kiu cetere okazos tuj antaŭ la 72a Universala Kongreso en Varsovio.

Informoj ĉe la landaj sekcioj de ILEI aŭ rekte ĉe la prezidanto de la loka konferenca komitato:

Tadeusz Ejsmont, ul. B. Bartoka 1 m 49,
PL-92-547 Lódź, Pollando.

6. Per la lernado de iu fremda lingvo oni ekkonas sian gepatran lingvon. Sen konscia kono de sia gepatra lingvo oni ne profunde povas regi fremdan lingvon (se la fremda lingvo estas lernata ekster la medio, kie ĝi funkcias kiel normala, ĉiutaga interkomunikilo). Do — komparoj inter la gepatra lingvo de la Esperanto-lernanto kun la strukturo de Esperanto estas necesaj, por ke elformiĝu en la cerbo mensa-lingva memstareco, kiu siavice helpos al la nuna lernanto pli poste memstare decidi, ĉu ĉi tiu strukturo aŭ tiu formo de Esperanto-esprimo estas preferenda aŭ ne (ekzemple proverbojn, internaciajn vortojn, idiomaĵojn). Estas rekomendinde, antaŭ la starto de nova Esperanto-kurso iamaniere "subesplori" la individuan konon de la gepatra lingvo en la rondo de niaj novaj Esperanto-adeptoj.

7. Metodoj per si mem nenion rezultigas, ili havas efikon nur se ili trovas la ĝustan personon-instruiston, kiu sentas en si la inklinon, la emon apliki ilin, eksperimenti per ili, provi ilian taŭgecon por li mem kiel individuo. Se la metodologo pli similas al sciencisto, la metodikisto devas alproksimiĝi al artuloj kaj la instruisto devas esti psikologo-praktikulo; sed nepre en du direktoj — rilate al siaj lernantoj kaj ankaŭ rilate al si mem.

Laŭ psikologia vidpunkto la nombro "sep", malgraŭ la plej modernaj mondkonceptoj, havas feliĉigan signifon. Pro tio mi nun finas mian penskolekteton, esperante, ke la spertinterŝanĝo realiĝu trans la limoj en ĉiuj "ĉielaj direktoj" — treege tikla metodikrilata problemo, ĉu ne?

T. Dahlenburg

ESTRARA KUNSIDO:

Ĝis kvin minutoj post la noktomezo

La 29an kaj 30an de marto la Estraro de UEA kunsidis en la roterdama domo. La estraranoj traŝvitis tagordon, kiu konsistis el 121 punktoj, tiel ke fakte la kunsido fariĝis tritaga. Nome, kiam prezidanto H. Tonkin deklaris ĝin finita, la 31a de marto aĝis jam kvin minutojn. Notindas, ke nun la estraranoj renkontiĝis unuafoje en plena konsisto post la UK en Pekino.

La ampleksa laborlisto tuŝis ĉiujn aspektojn de la funkciado de la Asocio. La Estraro mem estis temo de diskutado; i.a. pro tio, ke Victor Sadler, la estrarano pri financoj, la 22an de marto decidis pro malsaniĝo retiriĝi el ĉiuj funkcioj en UEA. La perdo, kiun tiu decido signifas por ni, speguliĝas en la fakto ke d-ro Sadler lasis sian estraranan laborsektoron en tiel bona ordo, ke nova financa respondeculo ne tuj estas bezonata. Oni antaŭvidas, ke lia eventuala anstataŭanto estos elektita en Varsovio; intertempe, d-ro Sadler pretas esti konsultata kaza de neceso.

La estraranoj ĝenerale konstatis, ke la nova disdivido de respondecoj decidita en Pekino (*Esperanto* 1986/p.150) ne efike funkciis ĝis nun. Tial necesis repritrakti detaligon de la diversaj taskoj kaj sektoroj. Krome, d-rino Szabó-Felső reprenis de la Ĝenerala Direktoro la taskon de kunordigado de laboro kaj informfluo ene de la Estraro.

Koncerne la Centran Oficejon, la estraranoj notis kun kontento (kaj verŝajne sento de senŝarĝiĝo), ke la novaj stabanoj rapide progresas kaj, sekve, la oficejo pli efike funkcias. Tial estis kun aparta bedaŭro, ke ili devis akcepti la decidon de la Direktoro de la C.O., Osmo Buller, forlasi sian postenon por alia laboro en Finnlando antaŭ la jarfino. Anonco pri la vakonta posteno troviĝas aliloke en ĉi tiu numero. Diskutoj cetere daŭras pri la administra kaj financa sistemo de la C.O., surbaze de raporto de Sadler pri nova financa strukturo de UEA kaj tiu de Gian Carlo Fighiera pri ĝenerala raciigo de mastrumado de la Asocio. Proponoj pridiskutataj inkluzivas i.a. apartigon de la C.O. en la buĝeto kiel memstara "entrepreno" kaj eventualan sendependigon de Grafika Centro Antverpeno (kiu cetere montris 20 000-guldenan pozitivan saldon en 1986) disde UEA.

La Estraro akceptis por pludono al la Komitato la spezokonton 1986. La fina negativa saldo estas ĉirkaŭ 20 000 gld. Ĝenerale la financa bazo de UEA kontentige evoluas, pro kio eblis en la pasinta jaro nuligi la negativan saldon, kiu postrestis la malfondon de Scienca Eldona Centro en Budapeŝto (ĉ. 32 000 gld.). En ĉi tiu kunsido oni findecidis pri utiligo de la kurzgajno restanta post repago al pekinaj kongresanoj: entute 85 000 gld. estas celitaj helpi la movadon en evoluantaj kaj nepagipovaj landoj per libroaĉetoj kaj per starigo de nova fondaĵo por subvencii vojaĝkostojn de triamondaj aktivuloj al Universalaj Kongresoj.

Esperanto-Propaganda Asocio proponis al UEA la establon de "Premio Onisaburo Deguchi", honore al la kunfondinto de Oomoto. La premio celas regule distingi la plej meritajn agadojn kaj projektojn, rilate utiligon de Esperanto por monda paco kaj interkultura kompreniĝo (laŭ la kvara celo en la Statuto de UEA). Aparta interkonsento kun EPA estas subskribita, kaj la unua aljuĝo okazos en Varsovio (laŭ sumo de 4 000 gld.). Vicprezidanto Umeda surprizis siajn kolegojn per sciigo pri alia, grandega donaco al UEA fare de japana esperantisto, kiu per tiu nobla ago celas kreon de firma organiza bazo de UEA en Azio. Zorgaj esploroj necesas, por trovi plej adekvatan manieron, kiel konkretigi tiun celon. La koncernan decidon oni anoncos en Varsovio.

Oni ankaŭ akceptis la Regularon de Terminologia Esperanto-Centro. Sekve, TEC ekfunkcios, kiel planite, en la varsovia UK.

Salutinda estas la decido, ke la raporto de la Estraro pri la agado en 1986 ĉi-jare ne aperos kiel numero de la revuo, sed kiel aparta broŝuro. **mf/ob**

Ekkoni la mondon per internacia korespondado

Post la unua mondmilito, franca instruisto en elementa lernejo — *Célestin Freinet* (elp. "frene) — pro diversaj kialoj, kiujn mi ne analizos ĉi tie, malkovris, ke infanoj en si mem reprezentas nemezureblan potencialon. Li serĉis kaj trovis rimedojn instigi tiun potencialon al eksteriĝo.

Li enirigis la vivon en la klasĉambron. La knaboj perdis sian pasivecon kaj volonte verkis libertemajn tekstojn pri travivitaj eventoj aŭ pri propraj sentoj. Baldaŭ ili komencis interŝanĝi siajn tekstojn ne nur kun la samklasanoj, sed ankaŭ kun klasanaro de malproksima regiono. En 1924 du-trifoje semajne la poŝto de sudfranca vilaĝeto kunportis komence nur leterojn kaj presitajn tekstojn al klaso de bretona vilaĝeto. Baldaŭ al la skribaj mesaĝoj la infanoj aldonis produktojn de la regiono (figojn kaj olivojn el Sudfrancio, krespojn el Bretonio), tiutempe malmulte konatajn eksterregione.

Tiel — antaŭ pli ol sesdek jaroj — komenciĝis nova pedagogia sistemo, konata nun sub la nomo *Freinet-pedagogio*. Ĝi disvastiĝis unue en francaj elementaj lernejoj kaj poste — kun adapto — en la antaŭelementaj, mezgradaj kaj liceoj, por ankaŭ ekiri eksterlanden.

Skizan rakonton pri la vivo de Freinet vi povas legi en broŝuro verkita franclingve fare de naŭjaraj infanoj, tradukita Esperanten de la subskribintino*.

Kelkaj principoj de Freinet

Unu el liaj principoj estis: "Oni ne trinkigas ĉevalon, kiu ne soifas". Li ĉiel uzis la naturan deziron de infanoj *komuniki*, por kompreni kaj esti komprenata. Li forigis la truditan instruadon, kiu uzis rigidajn lecionojn kaj ekzercojn. Tuj formiĝis ĉirkaŭ li amika rondo de geinstruistoj, kiuj kreis en siaj klasoj similajn kondiĉojn kaj donacis al la infanoj la grandan plezuron de komunikado, memmalkovro, efika laborado kaj kunlaborado.

Je kiuj konceptoj baziĝas la Freinet-pedagogia sistemo?

- **Nur la vivo plenefike instruas la homon.** Konsekvence ni larĝe malfermas la klasĉambron al ĉio vivanta, enigante eksterajn naturaĵojn kaj sociajn okazaĵojn kaj starigante rilatojn kiel eble plej multnombrajn kun la ekstera mondo.
- Vera kaj profunda edukado fontas el laboro, ne el ia ajn laboro (aparte kaj tute ne el altrudita laboro), sed el la laboro libervole elektita, dezirata. **La lernotaj temoj nepre venu de la infanoj mem.**
- Kompreneble ankaŭ Freinet-pedagogio celas instrui infanojn skribi, kalkuli, legi. Sed al la altruditaĵoj — al la punoj, la konkurenco, la tradiciaj metodoj — ĝi anstataŭmetas elfunde streĉan motivon, **la kontentigon de vitalaj bezonoj.**
- Unu el la nepraj kaj esencaj bezonoj ĉe infanoj estas la **esprimdeziro, la impeta deziro komuniki kaj agi.** El tiu ĉi principo fontas libervola verkado pri temo tute libere elektita, libervola sinesprimado per desegnaĵoj, pentraĵoj, dancado, kantado ktp.

Ĉu vi imagas, kiom el la lernotaj temoj povas rilati al korespondado, preskaŭ nedepende de la aĝo? La korespondado estas en Freinet-klasoj la centro de la instruado. Fontas el ĝi ne nur lernado de la nacia lingvo, geografio, historio, matematiko, sciencoj, sed ankaŭ tra ĝi formiĝas la psiko.

Estas memkompreneble, ke en la Freinet-movado, kies edukado celas interkompreniĝon, troviĝas ankaŭ esperantistoj. Oni iel povas starigi paralelon inter Esperanto kaj Freinet-movado, kies ideoj devenas de unu homo, kiu tuj donacis sian eltrovaĵon al aro da samideanoj.

Maturiĝo al eksterlanda korespondado: la rolo de esperanto

Neeviteble okazas, ke post praktikado de lerneja korespondado pere de la nacia lingvo la infanoj proponas: "Ĉu ni trovu korespondantojn alilande?" Tuj venas la lingvo-problemo, kiun ili ofte rapide solvas: "La instruisto tradukos!" Kaj ĉi-momente komenciĝas aparta rolo de esperantisto.

Komenciĝas la esploroj: trovi eksterlandan ir

---

* *Iu instruisto, Célestin Freinet.* Eldonaĵo de ICEM-Esperanto-Komisiono, Valence-sur Baise, 1984, 24p.

struiston, kiu pretas organizi korespondadon. Ofte necesas kelkaj klarigoj al la koleg(in)o pri rolo de la interŝanĝoj, kiuj en niaj Freinet-klasoj ne estas io aldonita de la instruisto al la lerneja programo, sed esenca aktiveco de la infanoj.

Diversmaniere aspektas la leteroj, sed plej ofte temas pri kolektiva letero skribita nur unuflanke sur grandega paperfolio, per grandaj literoj kaj ilustrita per desegnaĵoj. Eksterlandaj esperantistoj plurfoje diris al mi: "Freinet-movado? Tiu pedagogia francdevena movado, kies gelernantoj skribas kolorajn leterojn sur grandegaj paperfolioj!"

Mi regule petis la infanojn rekopii la leteron en la nacia lingvo, sur ĉiun trian linion. Mi mem, per alia koloro skribis la Esperantan tradukon kaj restis li-

Ilustraĵoj el la marta numero de ICEM Esperanto, *la kvaronjara bulteno por esperantistaj Freinet-pedagogoj. Abonoj kostas 50 FF (15 [redacted]oj), ĉe 1 rue Galissonniere, Le Pallet, F-44330 Vallet, Francio.*



nio por la lingvo de la korespondantoj. Mi petis reciprokecon tial, ke sur ĉiu letero aperu la tri lingvoj. Tiel sub la infanaj okuloj Esperanto rolas kiel pontlingvo. Ankaŭ la fremdecon de la nekonata lingvo la infanoj propraokule spertas kaj sen superfluaj klari-[redacted] konscias pri pli granda facileco de Esperanto. Antaŭ ol sendi la kolektivan leteron ni ĝin afiŝas sur la muro, por ke la klasanaro ĝuu sian laboron. Spontane ŝprucas lingvo-rimarkoj pri la du tekstoj.

Je la ricevado de letero ni lasas la infanojn ĝin rigardi, admiri, "analizi", kompari, kompreni antaŭ ol traduki. Ili deziregas kompreni, ĉar ili havas la internan fortegan motivon interkomuniki kun la foraj geamikoj. Ĉio ŝprucas senorde, kiel torento, kies forto montras la profundan vivo-forton de la klasanaro. Poste ne devige en la sama tago, pli discipline la instruisto kaj la infanoj traktos la malkovrojn... Maturiĝos ĉio, ne gravaş ĉu malrapide.

Ekinstruado de Esperanto

Korespondado en la nacia lingvo vekas la deziron legi, skribi, verki. Korespondado en la internacia lingvo donas plezuron malkovri duan lingvon kaj tuj konstati ĝian efikon kiel la pontlingvo.

La lernantoj petas instruiston legi la leteron. Ili tuj rimarkas multon: la frazmelodion, la finaĵojn, la similajn vortojn. Tiun, kiu rekopias, frapas la pli granda kvanto da literoj "z", "k" ktp.... ĝis foje venas la demando: "Ĉu vi povus ekinstrui al ni la lingvon?"

En Francio la Freinet-klasoj situas en ŝtataj lernejoj kun samaj programoj, kiel la aliaj, sed la instruisto kun sia geknabaro havas sufiĉe da libereco ekinstrui la lingvon, el kio fontas multaj komparoj kun la nacia. Mi plurfoje spertis, ke facile sukcesas enmigrintoj, kiuj lernas lingvon egale nekonatan al ili kaj al la aliaj samklasanoj. Tiu lernado valorigas ilin.

Psika rolo de internacia korespondado

Kiam la klasĉambron envenas eksterlandaj korespondaĵoj, samtempe plilarĝiĝas la viv-horizonto de la infanoj.

- Venas interesiĝo pri la lando(j) de la korespondantoj. Iom post iom ni spertas ŝanĝojn en la intelekta kaj senta sinteno vid-al-vide malsimilajn kutimojn, kiujn ili provas ne ĵugi, sed kompreni kaj respekti.
- Ili fariĝas pli komprenemaj ankaŭ al aliaj landoj eĉ se ili ne havas tie korespondantojn.
- Ili malkovras la absurdecon de rasismo,
- kaj samtempe pli ekzaktan nocion de amo al la propra lando, sen ŝovinismo.
- Naskiĝas la deziro de senperaj kontaktoj kun eksterlandanoj.

Helpas ne nur la korespondado, sed alia grava tekniko: "la kooperativa kunvivado". Ĉiu povas esprimi siajn opiniojn, rimarkojn. Okazas diskutoj en amikeca atmosfero. Infanoj ofte respeguligas ideojn de la gepatroj. En la klaso ili alkutimiĝas konsideri respektindaj kaj valoraj la opiniojn de aliaj infanoj, ne nur de la klasanojn, ankaŭ de la korespondantoj. Temas pri civitana edukado.

Ĉu infanoj ŝatas internacian korespondadon? ***Jes!!!*** Pri ĝi ili parolas hejme, la gefratoj envias ilin, la gepatroj malkovras nekonatan esplor-kampon. La infanoj fieras, kiam venas vizitantoj: "Ĉu vi konas Esperanton, ĉu vi scias, kiu ĝin kreis?" ktp... Ili montras korespondaĵojn.

Esperanto donas la eblecon korespondi ĉien per nur unu lingvo. Uzado de Esperanto do estas plia tekniko, kiu kongruas kun aliaj Freinet-teknikoj. Jam en la unuaj jaroj de ekzisto de la Freinet-pedagogio, pioniroj kiel Bourguignon kaj Lentaigne uzis kun infanoj Esperanton kiel korespond-lingvon antaŭ ol instrui ĝin, dirante ke necesas unue krei la motivojn.

Luiza Marin

Jubilea kongreso kaptas atenton en Hungario

En marto ekis grava agado en Hungario por inde soleni la centjariĝon de Esperanto. Ĝi komenciĝis per gazetara konferenco la 9an de marto, okazinta en la sidejo de la Asocio de Hungaraj Ĵurnalistoj.

Al la kolektiĝintaj ĉ. 30 ĵurnalistoj skizis la ĉefajn aspektojn de la internacia lingva problemo d-ro Vilmos Sághy, emerita ministro, prezidanto de Hungara Esperanto-Asocio. Li konigis ankaŭ la agadon de HEA, kaj detale informis pri la programo de la 28a Hungarlanda Esperanto-Kongreso, okazonta inter la 20a kaj 22a de marto en Budapeŝto, kaj pri tiu de la 5a Internacia Renkontiĝo de Esperanto-Teatroj, kiu okazos inter la 20a kaj la 23a de marto enkadre de la Budapeŝta Printempa Festivalo en la Teatro "Miklós Radnóti". Pri la gazetara konferenco informis ĉiuj ĵurnaloj, inkluzive la multe spektatan vesperan televidan ĵurnalon, kaj aperis artikoloj pri Esperanto en multaj semajngazetoj.

Alta honorigo ĉe impona nacia kongreso

Montras la tre altan socian rekonon de la hungara Esperanto-movado, ke la inaŭguro de la 28a Hungarlanda Esperanto-Kongreso povis okazi en la Parlamentejo, en la impona salono de la iama supera ĉambro de la hungara parlamento. Ĉeestis ĝin pluraj altrangaj reprezentantoj de la hungara politika kaj kultura vivo, inkluzive plurajn parlamentajn deputitojn, malgraŭ la fakto, ke samtempe kun la inaŭguro en la sama konstruaĵo kunsidis la printempa sesio de la hungara parlamento.

La inaŭguron prezidis d-ro László Deme, tutlande konata renoma lingvisto, honora prezidanto de HEA. Festparolis d-ro Vilmos Sághy, poste petis vorton Tibor Baranyai, ĝenerala sekretario de la Nacia Konsilio de Hungaraj Sindikatoj. Li informis la 600-kapan publikon, ke la Prezidio de la Hungara Popolrespubliko okaze de la jubileo juĝis la Hungara Esperanto-Asocio la altan ordenon "Paco kaj Amikeco". (Estas menciinde, ke en Hungario ne estas kutimo distingi organizaĵojn — do la distin[illegible] de HEA estas iusence precedenco.) Poste Tibor Baranyai laŭtlegis la leteron de János Kádár, senditan al la Estraro de HEA, en kiu la ĝenerala sekretario de la Hungara Socialisma Laborista Partio gratulis la movadon pro la centjariĝo kaj la alta ŝtata distingo. Poste, meritplenaj esperantistoj povis transpreni altajn ŝtatajn, sindikatajn kaj aliajn distingojn, interalie Károly Fajszi, posedanto de unu el la plej grandaj privataj Esperantaj bibliotekoj (la Oran Gradon de la Ordeno de Laboro), kaj d-ro Flóra Szabó-Felső, ĝenerala sekretario de UEA (la Oran Gradon de la distingo "Pro Sindikata Laboro"). Krome kvin personoj, inter ili verkistoj, ĵurnalistoj kaj lingvistoj ricevis la distingon "Pro

En la nomo de la Centra Komitato de la Hungara Socialisma Laborista Partio kaj ankaŭ persone mi salutas Hungaran Esperanto-Asocion kaj ĉiujn partoprenantojn de via kongreso festanta la centjariĝon de la Esperanto-movado. La ekesto de la lingvo Esperanto kaj dekomence la movado mem reprezentas noblajn homamajn strebadojn: helpi interpopolan proksimiĝon, pli bonan interkompreniĝon kaj pli altan reciprokan estimon. La disvastiĝo de Esperanto en la pasintaj cent jaroj pruvis la ĝustecon de viaj movadaj celoj...

Dum la jardekoj post la liberiĝo, la aktivado de Hungara Esperanto-Asocio vaste disvolviĝis kaj kontribuis al la altigo de la monda prestiĝo de nia patrujo. Estas alte taksebla ankaŭ tiu misio, kiun la asocio plenumas en la diskonigo de la hungara kulturo.

Nun ni vivas en epoko, kiam la servado al ĉiuj ĉi celoj fariĝis pli grava ol iam ajn antaŭe. Ankaŭ via humanisma movado kontribuis al tio, ke la espero, esprimita eĉ en la nomo de la lingvo, fariĝu realo koncerne la pacan estontecon de la homaro, la pacajn interŝtatajn kontaktojn. Pensante pri ĉio ĉi mi elkore gratulas pro la alta distingo donacita de la Prezidio de Hungara Popolrespubliko, pro viaj ĝisnunaj rezultoj; kaj mi deziras multe da sukcesoj en la realigo de viaj noblaj celoj.

Kun koraj salutoj

János Kádár

ĝenerala sekretario de la

Hungara Socialisma Laborista Partio

Esperanto" pro sia longjara laborado por la disvastigo de la Internacia Lingvo.

Flóra Szabó-Felső salutis la Kongreson en la nomo de Universala Esperanto-Asocio, substrekante tion, ke UEA alte taksas la klopodojn kaj rezultojn de la hungarlanda movado.

Pri la inaŭguro de la Kongreso informis la samtaga televida ĵurnalo, kaj ankaŭ la sabataj ĵurnaloj publikigis informon pri ĝi. Estas notinde, ke ĉiuj ĵurnaloj aperigis la plenan tekston de la Kádár-letero.

Teatre kaj organize sukcesa

La 20an vespere komenciĝis la 5a Internacia Renkontiĝo de Esperanto-Teatroj. La Renkontiĝon malfermis Mihály Gergely, verkisto, estrarano de HEA. En la unua vespero rolis kun skeĉoj Stefan MacGill, la slovaka pupteatristo Tomáš Plaszký, kaj estis prezentita la unuaktaĵo *Gutoj* de la hungara verkisto Endre Gyárfás.

La 21an kaj 22an vespere gastrolis BET (Bulagara Esperanto-Teatro) kun la komedio de Arrabal: *Pikniko sur la batalkampo.* La 22an posttagmeze okazis pupteatra prezentado: la eterne verda *Johano la brava* denove rikoltis sukceson. La 23an vespere la publiko povis spekti la monodramon de Spomenka Štimec, *Virino, kiu flustris en uragano,* en la plenumo de Vida Jerman.

La 28a Hungarlanda Esperanto-Kongreso post la inaŭguro en la Parlamentejo la 21an kaj 22an de marto daŭrigis sian laboron en la kulturdomo "Láng". Enkadre de ĝi okazis multaj sekciaj kunvenoj, interalie ankaŭ tiu de la delegitoj de UEA. La Kongreso donis okazon ankaŭ por la aranĝo de la jarkunveno, kiu akceptis interalie novan statuton.

Sághy, Bárczi, Nemere: elstaraj figuroj en la informa ondo

La supraj eventoj, elvokintaj tre vastan gazetaran reeĥon, ja ne signifas la finiĝon de la jubileaj aktivadoj en Hungario. La interesiĝo de la publiko estas vekita, kaj ŝajne ankaŭ la gazetaro pretas doni al Esperanto multan atenton. Tiu rezulto kompreneble estas frukto de la komuna aktivado de la hungaraj esperantistoj, tamen estas necese substreki la agadon de d-ro Vilmos Sághy, kiu kun verva elano sin ĵetis en la esperantistan vivon. Laborinte 30 jarojn en altaj postenoj de la ŝtata administrado — antaŭ kelkaj jaroj li estis membro de la registaro — li povas tre multon fari por la movado, kaj li eluzas ĉiujn siajn eblojn por tio.

Lige kun la Kongreso okazis ankaŭ gravaj paŝoj sur la kampo de la informado. Aperis en aparta libreto la artikoloj pri Esperanto, kiujn verkis Géza Bárczi, la plej granda figuro de la ĉi-jarcenta hungara lingvoscienco. Ĝi estas la plej eminenta propagandilo por intelektulaj rondoj. Krome aperis la hungarlingva popularega libro de István Nemere *Libro de novaj sekretoj,* kiu enhavas tri artikolojn kiuj ligiĝas al la Internacia Lingvo: pri la persekutoj kontraŭ Esperanto, pri aliaj planlingvoj, kiuj estas "senesperaj konkurantoj" de Esperanto, kaj pri Sándor Szathmári. La eldonkvanto de la libro estas — 150 000 (en lando kun 10 milionoj da loĝantoj!). Librofine aperas reklamo pri koresponda kurso de Esperanto, kaj alvoko fariĝi subtena membro de HEA.

Vilmos Benczik

De maldekstre: La inaŭguro en la parlamentejo; Vilmos Sa
Károly Fajszi parolas ĉe la ekspozicio en la Nacia Bibliotek
Fajszi-librokolekto; sceno el **Pikniko sur la batalkampo.**



Post cent jaroj, for la profetaĵojn!

La 100-jaran jubileon oni festas ĉie en Esperantujo. Multajn kaŭzojn ni havas por ĝoji, sed ĉu eble la jubileo kaŭzos ankaŭ embarason? Mi asertas ke jes, ĉar ĝuste nun, ni pli ofte ol antaŭe prezentiĝas al la demando: se Esperanto post tiom da tempo ne venkis, kiuj kaŭzoj ekzistas por kredi ke la venko iam ajn venos? Indas serioze alfronti la demandon kaj zorge elpensi kion respondi.

Jam delonge la aĝo de Esperanto estas ofte prezentata argumento kontraŭ nia lingvo. La homoj diras: "Dum sia junaĝo miaj geavoj multon aŭdis pri Esperanto, nun neniu plu parolas pri ĝi." La plimulto ne pretas okupiĝi pri afero kiu dum jardekoj stagnas, kaj kiu dum certaj periodoj eĉ malprogresas.

Ankaŭ alian movadon turmentas profetaĵoj kiuj persiste rifuzas plenumiĝi, nome tiujn religiajn sektojn, kiuj predikas la tuj venontan pereon de la mondo. Eble vi pensas ke la argumentado de la esperantistoj — "Iam la homoj vekiĝos, iam ni realigos la internan ideon" — estas pli trafa; sed ĉu vere vi certas, ke la fino de la mondo ne povus veni plu frue ol la fina venko?

Ofta esperantista argumento: La disvastiĝon de Esperanto malhelpis persekuto kaj milito. — Sed persekuton suferis ankaŭ aliaj movadoj, ekz. la jam menciitaj religiaj sektoj. Ĉu konstateblas ke ilia hodiaŭa pozicio estas pli malforta pro la persekutoj de la hitlera epoko?

Eble incitas vin ne nur la komparoj kun religia movado sed entute la negativa tono de la eseo. Ĉu vere necesas sisteme nigrigi nian situacion, kaj eĉ en jaro kiam ĉiuj ŝatus festi kaj jubili? Ĉu mi ne povus skribi ion kuraĝigan, ekz. pri kiel efike argumenti? Certe jes, tion mi povus, eĉ intencas fari, sed vi havu iom da pacienco. Ĉar antaŭe mi volas prezenti analizon pri la mondo — ĉefe pri ĝiaj lingvaj aspektoj. Ĉu nuntempe la situacio estas sama, kiel en la tempo de Zamenhof? Kvankam neniu neas la fortan pozicion de la angla, multaj esperantistoj ankoraŭ argumentas samkiel antaŭ 100 jaroj. Sed kiuj estas la seriozaj rivaloj de la angla (krom Esperanto)?

"Malantaŭ la fera kurteno la influo de la angla estas minimuma." Tion antaŭ nelonge diris germana Esperanto-amiko. — Jam nun la angla estas la unua fremdlingvo en Sovetunio. Imagu kio okazos se post kelkaj jaroj la "glasnost"-politiko de Gorbaĉov kaŭzos pli ampleksan instruadon de okcidentaj lingvoj (do ĉefe de la angla). Tiam la argumento de mia amiko, kiu eble hodiaŭ estas iom prava, estos tute senprava. Verdire, nia movado ne bezonas argumentojn kiuj estas ankoraŭ iom pravaj, sed poste tute malpravaj. Ni bezonas argumentojn kiuj estas hodiaŭ pravaj, kaj estonte fariĝos daŭre pli pravaj!

Ĉu la rusa do estas serioza kanditato kontraŭ la angla kiel mondlingvo? En Danio slavistoj daŭre plendas ke ili post la studo ne trovas laborlokon, ĉar Sovetunio nenion faras por antaŭenigi la rusan. La korespondado kun Danio okazas preskaŭ ekskluzive en la angla.

"La tendenco de la lastaj jaroj direktiĝas ne al monopoligo de la angla sed al pli granda lingva diverseco." — Tion oni ofte asertas. Ekz. la arabaj landoj pro la nafta krizo sukcesis enkonduki la araban por korespondado kun aĉetantoj. Sed tia kazo kompareblas kun la bezono de la dana kiun havas en la tuta mondo fakuloj kiuj deziras studi la verkron de la dana filozofo Kierkegaard. Forta pozicio de iuj lingvoj en specialaj sferoj kaŭzita de specifaj bezonoj, ekz. de araba nafto aŭ dana filozofio, neniel signifas pli ĝeneralan, vastan uzon de tiuj lingvoj.

Tamen ni ne malesperu, vi eble diras. Ĉar la homaro travivis multajn ondojn de kultura kaj lingva superrego. Ili ne eterne daŭris. Same la nuna ondo iam finiĝos. — Tion ni certe esperu! Sed ni atentu ke naiva espero ne igu nin pretervidi bazajn faktojn. La antaŭaj ondoj ĉiuj estis nur lokaj, ampleksis nur malgrandan parton de la terglobo kaj ili atingis nur la suprajn tavolojn de la socio. Kontraste la nuna inundo ampleksas la tutan mondon kaj preskaŭ ĉiujn tavolojn de la socio. Apenaŭ ekzistas do grupoj kiuj post eventuala ĉeso de la inundo povus antaŭenigi alian kulturon.

Finfine estas tempo doni konkretajn konsilojn.

1. Vi konsciu bone ke ne pro stulteco la homoj ma akceptis Esperanton. Tute male, la problemo estas ke la homoj estas tro inteligentaj por akcepti la argumentojn de la esperantistoj. Vi do preparu vin al argumentado por inteligentaj homoj.
2. Ne kulpigu aliajn aŭ la eksterajn cirkonstancojn pri nia malsukceso. Naŭzas inteligentajn homojn tiuj movadoj, partioj kaj registaroj kiuj volas enkasigi nur sukceson, kaj sisteme kulpigas aliajn pri malsukceso.
3. Konfesu senkaŝe ke la manko de progreso kaŭzis krizon en la Esperanto-movado. La unuaj pioniroj seniluziiĝis pro la inerto de la mondo. Nur lastatempe ni komencis venki la krizon, konsciante ke la mondo ne estas tiom rapide ŝanĝebla kiom imagis la pioniroj. Pere de tia senrezerva konfeso vi donas impreson pri serioza informado

KONKURSO

"Laŭ artikolo en The Linguist *(Britio), n-ro 1, 1987, p.8-9, estas 8 000 000 da e-istoj en la mondo, el kiuj 10 000 en Britio (kaj maksimume 2 000 en Belgio).*

"Kie troviĝas la 7 988 000 aliaj?" demandas Germain Pirlot. Ankaŭ ni. Kaj por esplori viajn pensojn pri la afero, ni anoncas ***konkurson*** *kun la jenaj reguloj:*

1. ***Skribu sur poŝtkarton*** *du ciferojn:* ***(a)*** *kiom da e-istoj, laŭ vi, ekzistas en la mondo (laŭ kiu ajn kriterio, kiun vi volas apliki);* ***(b)*** *kio estas la meza (averaĝa) cifero, kiun divenos la respondantoj al demando (a) — t.e., la plej akceptata cifero inter la esperantistoj mem.*

2. ***Sendu*** *la poŝtkarton al la redaktoro de Esperanto, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando, por atingi nin* ***ĝis la 30a de junio.***

3. Ni kompilos la respondojn kaj lotumos inter la respondintoj ***tri premiojn*** *elektitajn el la jubilea eldonserio de UEA. La rezultoj estos anoncitaj en la* ***kunveno de legantoj de la revuo*** *kadre de la varsovia UK. (Se vi tamen ne venos tien, ne zorgu — ni poste aperigos la rezultojn en la revuo mem.)*

anstataŭ pri senbrida idealigo. Ankaŭ Esperantujo bezonas iom da "glasnosto".

4. Profetaĵojn vi faru nur se viaj spertoj senkontesteble pruvis vian parapsikologian dotitecon. Alikaze vi lasu ĉiajn profetaĵojn. Tio signifas ke ne eblas antaŭvidi la finan venkon de Esperanto. Sed konsoliĝu, ĉar ankaŭ ne eblas antaŭvidi ke ĝi **ne** venkos!
5. Multaj homoj havas linian koncepton pri evoluo, laŭ kiu ideo estas definitive rifuzita de la historio se ĝi dum certa tempo stagnis aŭ malprogresis. Trovu trafajn ekzemplojn kiuj montras ke la evoluo ne nepre okazas laŭ tia linia maniero.
6. Vi ne asertu ke la fremdlingva instruado, precipe de la angla, estas fiasko. La plimulto vidas kiel grandiozan sukceson, ke la junaj generacioj pere de la angla kapablas praktiki internacian komunikadon je nivelo pri kiu antaŭaj generacioj eĉ ne kuraĝis revi. Se vi paŭte ignoras tion, vi ridindigas vin mem (kaj bedaŭrinde ankaŭ la Esperanto-movadon).
7. Surbaze de agnosko de la rezultoj de la ĝisnuna lingvopolitiko vi atentigu ankaŭ pri ties mankoj kaj limigoj, t.e. lingva kaj kultura diskriminacio ktp. La celo de la Esperanto-movado **ne** estas kontraŭbatali la pozicion de la angla, ĉar tio estus absurda. Nia celo estas realigi internacian komunikadon pli altkvalitan ol la ĝisnuna, sen ties mankoj kaj malavantaĝoj. — Eble vi komprenas ke pere de tia argumentaro eblas inter instruistoj de fremdlingvoj trovi alianculojn anstataŭ kontraŭulojn?
8. Internacian komunikadon je nivelo de egaleco, sen diskriminacio ni daŭre praktikas en nia esperanta **lingva komunumo** kiu ĝuste ĉi-jare havas 100-jaran tradicion. Ĝi solidiĝis tiel ke ĝia ekzisto ne plu estas minacata. Ĝin vi prezentu al la ekstera mondo. Vi fieru, sed ne troigu! Eble vi vidas ke pere de emfazo de kultura tradicio anstataŭ profetado, la aĝo iĝas argumento **por** kaj ne kontraŭ Esperanto. Dume, la daŭra ekzisto de nia lingva komunumo ebligas, ke iam ajn se la cirkonstancoj estos maturaj, la mondo elektos Esperanton kiel komunan lingvon.
9. Rakontu pri la persona ĝojo kiun vi havas pere de Esperanto. Ne hontu pri hobiaj aspektoj kiel kolektado de poŝtmarkoj. Ili estas minimume same valoraj kaj "seriozaj" kiel ekz. apliko de Esperanto en la komputila fako. Per tio ĉi mi tamen ne volas diri ke nia lingvo ne postulu pozicion en la menciita fako (la aldonon de ĉi-lasta frazo devigis al mi la posedantino de la komputilo pere de kiu mi tekstprilaboris ĉi eseon).

Esperinde la eseo inspiros vin al novaj manieroj de pensado kaj argumentado, laŭ kiuj la aĝo estas argumento **por** kaj ne kontraŭ nia lingvo, por ke ni povu fini la ĝisnunan atendadon de Godot* dum kiu ni daŭre alpremiĝas al muro de ne-plenumitaj profetaĵoj... Al ĉiuj ĝojan jubileon!

Vaŭn Fraŭsin

** Aludo al la fama dramo de Samuel Beckett; Godot fakte neniam alvenas.*

La stabo de la Esperanto-redakcio de Radio Polonia. De m.d., fone: Jan Klimek, Barbara Pietrzak, Jerzy Uśpieński, Anna Henn, Lucjan Szolajski, Piotr Rowiński; antaŭe, Milada Szwedo, Andrzej Pettyn (ĉefredaktoro), Jerzy Grum.

Radio Polonia en la jaro 1987

La Esperanto-sekcio de Radio Polonia (la pola nacia radiostacio) komencis siajn elsendojn la 4an de aprilo 1959, kiel prepara etapo en la okazigo de la zamenhofjara UK en Varsovio. Montriĝis tiel amasa interesiĝo pri la elsendoj, ke la sekcio pretervivis la kongreson kaj ĝiaj programoj fariĝis pli kaj pli ampleksaj kaj oftaj. Nun, post 28-jara ekzisto, ĝi disaŭdigas ses elsendojn en Esperanto ĉiutage. La estro de la redakcio, Andrzej Pettyn, sendis al ni kelkajn komentojn pri ilia laboro en la Jubilea Jaro.

Unuavice ni volas laŭeble vaste informi pri la diversaj jubilejaraj iniciatoj de UEA kaj de landaj organizaĵoj, fakaj asocioj, lokaj grupoj ktp, por tiamaniere instigi al pli intensa agado kaj por peri imitindajn iniciatojn. Pro tio ni estas dankemaj al ĉiuj, kiuj liveras al ni freŝdatajn informojn pri sia jubilea agado. Lige kun la 72a UK ni jam komencis dissendi pri la preparlaboroj de la kongreso. Specialan atenton ni dediĉas al la utiligado de la lasta Unesko-rezolucio, kies enhavon oni ĝis nun — escepte de 4-5 landaj organizaĵoj — ne ekspluatis sufiĉagrade, kvankam ĝi tute klare rilatas al la Jubileo.

Ni atentigas pri la fakto, ke per la Jubilea Jaro ne finiĝas la esperantistaj iniciatoj. Tute male — ili malfermas novan agad-kampon, kiun oni pli frue priflegu, ĉar necesas ellabori taŭgajn informilojn, lernolibrojn ktp. Ni klare konsciu la fakton, ke en 1987 ne finiĝas la afero de Esperanto. Eĉ plej eta aktivaĵo povas bele kontribui al la celo! Pro tio oni ne hezitu, sed sendu la ĉi-koncernan materialon al la adreso: Radio Polonia, Esperanto-redakcio, PL-00-950 Varsovio, Pollando.

Kvante rekorda, kvalite plibonigenda

Ĉiujare multaj personoj eklernas Esperanton. Inter ili multaj ne havas la eblecon partopreni internacian renkontiĝon. Por ili nur la korespondado estas rimedo por kontakti alilandanon — unuflanke por pli bone lerni la Internacian Lingvon, aliflanke por konstati, ke Esperanto estas vivanta lingvo. Kiom da komencantoj forlasas la studadon de Esperanto ĉar ili ne povas ĝin praktiki!

Por eviti tiun perdon de samideanoj, la respondeculoj de Esperanto-kursoj devus inviti siajn lernantojn al praktiko de nia lingvo per korespondado. Jen la funkcio de Koresponda Servo Mondskala, kiu dum jardekoj peris tiajn kontaktojn. Sed [illegible] kontentige plenumi sian rolon, KSM bezonas esti pli bone konata, kaj havi pli da adresoj de bonaj esperantistoj kiuj pretas helpi la komencantojn. Aparte frapas la geografia malekvilibro, kiu videblas en la statistikoj por la pasinta jaro.

En 1986 ĉe KSM enskribiĝis 653 novaj aliĝintoj, 17%-a kresko kompare kun 1985. Estas rekorda nombro de post 1961 kaj verŝajne de la komenco (pri kiu mi ne povas trovi precizajn informojn). Oni povas kalkuli ĉirkaŭ 12 000 personojn, kiuj uzis KSM de 1955 ĝis nun — 2 000 de kiam mi ekrespondecis, fine de 1983. Plie, dum la jaro multaj enskribintoj de antaŭaj jaroj uzis denove la servon, tiel ke en 1986 KSM sendis 709 leterojn kun verŝajne pli ol 3 000 adresoj. Jam ĉi-jare simila kresko en intereso estas videbla.

Tamen ni ne konkludu, ke KSM funkcias perfekte. El la 653 novaj alskribintoj el 54 landoj, 136 estas polaj (pli ol 20%), 66 iranaj (pli ol 10%). El [illegible] landoj venis malpli ol 3% de la aliĝoj. Kial en landoj, kie la esperantistoj estas tamen sufiĉe nombraj, ne estas pli da korespondemuloj? — neniu en Aŭstrio, Danlando... unu el Belgio... kvar el Italio... Certe el Eŭropo estas la pli multaj alskribintoj, pli ol 66%, sed 44% el Orienta Eŭropo kaj nur 22% el Okcidenta.

En tiu granda diferenco de iu lando al alia kuŝas la neebleco kontentigi ĉiujn petantojn. Mi atendas pli da leteroj el Okcidenta Eŭropo, Skandinavio, Usono, Kanado, Sudameriko, Japanio, Aŭstralio (tre petata!). Dume mi disponas pri multaj adresoj en Pollando, Ĉeĥoslovakio, Hungario, Irano. Multaj afrikanoj atendas helpon de bonaj esperantlingvanoj por plibonigi sian lingvoscion (en 1986, 8% el la tuto).

Ĝenerale la jenaj konsiloj al novaj petantoj validas:

1. Ĉiu devas peti plurajn landojn kaj plurajn temojn por ricevi baldaŭan respondon. Eĉ dekoj da petoj por francaj korespondantoj ne povis ricevi favoran respondon.

2. Estas grave, ke oni aldonu internacian respondkuponon aŭ neuzitajn francajn poŝtmarkojn. En 1986 KSM ricevis pli ol 400 petojn sen kotizo, dum ĝi ricevas nenian subvencion kaj pagas ne nur sendokostojn sed diversajn aliajn elspezojn. Dankon al la dudeko da amikoj kiuj donacis monon pasintjare.

3. Same gravas, ke kiam oni ricevis respondon de KSM oni aŭ sendu leteron aŭ informu KSM, ke oni ne uzos tiun adreson. Eble plimulto de la senditaj adresoj ne estas uzitaj. Eventuala solvo estus sendi adresojn samtempe al du interkorespondemuloj, sed duobla elspezo estas nuntempe neebla. Se la kaso de KSM estus pli plena, ankaŭ pli bona informado eblus.

Por pliaj informoj pri KSM skribu, aldonante irkon aŭ neuzitajn francajn poŝtmarkojn, al R. Llorens, Hortensias 2, 121 bis Bvd Napoléon III, F-06200 Nice, Francio. La UEA-konto de KSM, por eventualaj donacoj, estas ksmx-i.

R. Llorens

KIO PLEJE VENDIĜIS EN 1986?

1.	Plena analiza gram. (Kalocsay/Waringhien)	48,00
2.	Faktoj kaj fantazioj (Boulton)	36,00
3.	La nobla korano (trad. Chiussi)	66,00
4.	Amo kaj morto en Balio (Baum)	28,50
5.	Esperanta antologio (red. Auld)	60,00
6.	Amuza matematiko (Arnaudov)	9,90
7.	Plena ilustrita vortaro (Waringhien)	129,00
8.	La lingva esenco de Esperanto (Atanasov)	27,00
9.	Li kaj ni (red. Haupenthal)	66,00
10.	Eo and English Dictionary (Wells)	23,70
11.	Doña Bárbara (Gallegos/trad. de Diego)	16,20
12.	Perkomputila tekstoprilaboro (red. Koutny)	30,00
13.	Kvardek vidindaj lokoj en Ĉinio	9,00
14.	Lingvaj aspektoj de Eo (Migliorini)	24,00
15.	Biblia vortaro (Paruzel/Wojtakowski k.a.)	69,00
16.	Dek ses urboj en Ĉinio	7,80
17.	Syntactic Tree Structures in DLT (Schubert)	66,00
18.	Ĉu rakonti novele? (Valano)	21,00
19.	Sferoj 4; Sciencfikcio kaj fantasto (div.)	18,00
20.	Pitoreska Pekino	4,50

Estas malfacile konstrui liston de la plej furoraj Esperantaj libroj. Ĉi-kune ni prezentas la tradician jarliston de la Libroservo de UEA, sed ni tuj atentigu pri ĝiaj limoj.

Unue, la listo baziĝas nur sur unuopaj aĉetoj de niaj klientoj. Pograndajn vendojn ĝi ne inkluzivas. Se ni enkalkulus ankaŭ ilin, la pinton konsistigus *Gerda malaperis* (451 ekz.), *Faktoj kaj fantazioj* (400), PAG. (362), *Amo kaj morto en Balio* (353), *Eo aŭtodidakte* (330), *Praktika bildvortaro de Eo* (237), *Kumeŭaŭa* (210), *Syntactic Tree Structures in DLT* (131) kaj *La lingva esenco de Eo* (122), se mencii nur tiujn, kies vendado superis 100 ekz. Kvar el ili ne aperas en la listo de la unuopaj vendoj. Bazante nur sur unuopaj aĉetoj ni celas rangoliston, kiu rekte spegulas la ŝatojn de la legantoj. Pograndaj vendoj ĉefe iras al aliaj libroservoj kaj ne nepre pluvendiĝas samjare.

Due, temas pri furorlisto de *nia* libroservo. Kvankam ĝi estas la plej granda en la Movado, ĝiaj vendoj ne nepre estas tutmonde reprezentaj. Pensu ekz. pri la verkoj de nia plej furora romanisto I. Nemere, kiu neniam aperis en nia listo. La libroservo de Hungara E-Asocio certe montrus liston, kiu aspektus alie. Simile pri Japana E-Instituto k.a. gravaj librejoj.

En la nuna listo ni retrovas ĉe pintaj lokoj konatajn bazajn verkojn, kiujn akompanas du surprizantoj: *La nobla korano* kaj *Doña Bárbara*. La unua pro la jarkomenca speciala rabato kaj la dua — tion la ceteraj eldonistoj bone notu por agi same — dank' al reklamado en tiu ĉi revuo. Pekinaj kongresontoj ŝajne bone sin preparis por la vojaĝo, ĉar la tri ĉinaj turismaj libroj vendiĝis ĉefe antaŭ la UK. Tre bone akceptiĝis *Amo kaj morto en Balio,* la sola nova eldonaĵo de UEA mem.

Ĝojigas la sukceso de *Biblia vortaro*, kvankam ĝenis ĝian vendadon, ke ni devis ofte atendi la plenumon de niaj propraj remendoj. Jen unu trajto de la Esperanto-merkato: malfruado kaj malrapido. Daŭras monatojn, eĉ pli ol jaron, ĝis kelkaj eldonejoj sciigas nin pri siaj novaĵoj aŭ plenumas niajn mendojn. Sekve, la rubriknomo "Laste aperis" iom ofte sonas sufiĉe strange. Krome, amatoreco montriĝas ankaŭ en plena neglekto de reklamado. Apud *Doña Bárbara* alia bela escepto estas *Kalevala:* spite la altegan prezon ĝi altiris aĉetojn post reklamoj en la revuo. Tiun ĉi duan eldonon de la epopeo ni tamen uzu kiel ekzemplon ankaŭ pri eraro, ofta en nia rondo: mistakso de efektiva vendeblo, sekve troa eldonkvanto, sekve tro alta prezo, sekve malrapida vendado. Antaŭ ol decidi, ĉu entute eldoni iun libron kaj en kiu kvanto, oni konsultu tiujn, kiuj konas la merkaton. Propra entuziasmo iom tro ofte ne kongruas kun tiu de la aliaj. La bonega vendado de libroj de ekz. Hungara E-Asocio (vd. *Esperanto* 1986/p.182) eblas, ĉar la eldonado de HEA estas gvidata de vera fakulo. **ob**

Lingvo ne nur por kleruloj

La artikolo, al kiu prof. Lapenna reagas en la februara numero, defendas anstataŭigon de greklatin-devenaĵoj per Esperantaj vortoj. Ekzemple: "aseco" anstataŭ "prezenco". La germanoj faris ion similan en sia lingvo. Ili diras: Kraftwagen (aŭto), Fahrrad (biciklo), Fernsprecher (telefono). Ĉi tiuj vortoj estas nur kelkaj ekzemploj el granda nombro. Kial ĉi tiu faro ne estus ebla en Esperanto?

Kiam Zamenhof kreis sian lingvon, la aziaj landoj ludis negravan rolon sur la monda scenejo. Kompreneble li uzis nur eŭropajn lingvojn kiel fontojn. Sed nun Ĉinio — kun kvinono de la mondloĝantaro! — kaj Japanio troviĝas inter la plej gravaj landoj. Por ke Esperanto prosperiĝu, estas necese atenti pri ĉi tiu nova stato. Tio signifas interalie, ke eŭropaj vortoj laŭeble cedu lokon al Esperantaj.

Prof. Lapenna skribas ke la redaktoroj de Esperanto-periodaĵoj en Azio bone komprenas la eŭropan Esperanton. Evidente li forgesas ke homoj kun ilia klereco konsistigas etan malplimulton. Por preskaŭ ĉiuj ne-eŭroplingvanoj lernantaj Esperanton, "aseco" estas pli facila ol "prezenco". Kaj ili ne bezonas la lastan vorton por paroli kaj skribi flue la lingvon! Tio aplikiĝas ankaŭ al multaj aliaj vortoj.

La skribinto vidas nur ĝis la limoj de sia malvasta rondo de kleruloj. Ordinaraj homoj ŝajne ne ekzistas por li.

K. Riemersma (Nederlando)

Pri blufoj kaj fanfaronoj

Mi estis iom ŝokita leginte la cetere interesan artikolon de Mark Fettes en la februara numero de *"Esperanto"*. Parolante pri la internacia rolo de la angla, la aŭtoro citas artikolon el *The Economist* kaj tute senkritike reproduktas mapon, kie estas evidentigata la distribuo de la angla lingvo en la mondo.

Mi min demandas: ĉu eblas akcepti senrefute tiajn blufojn, blagojn, fanfaronaĵojn? Ĉu iel kredinde deklari, ke la angla estas denaska lingvo de Tanzanio? Ĉu, ke ĝi estas dua lingvo de dudeko da aliaj landoj? Asertante, ke, en tiuj landoj, ĝi estas la dua lingvo, oni implicite volas kredigi, ke tia ĝi estas por ĉiuj enloĝantoj, tiel pravigante la emfazitajn (kaj blovitajn) ciferojn.

Laŭ mi oni povus maksimume aserti ke, ekzemple en landoj kiel la skandinaviaj, la angla estas la dua lingvo de la junaj **kulturitaj generacioj,** do de limigita parto de la tiea loĝantaro. Same, en landoj, kiel Hindio, Pakistano kaj pluraj afrikaj, oni povus eble diri nur, ke ĝi estas la dua lingvo de la elitaj klasoj, komplete nekonata al plurmilionaj indiĝenoj de la internaj kaj subevoluintaj regionoj.

Se la anglalingvanoj rajtas tiel senhonte fanfaroni pri la disvastiĝo de sia lingvo, ni ne tro ruĝiĝu se ankaŭ en niaj vicoj iuj foje troigas parolante pri plurdekmiliona parolantaro de Esperanto.

Aldo de' Giorgi (Italio)

Esperanto kaj la angla
10 tezoj por diskuti

1. En sia centa jaro, Esperanto estas en simile malfacila situacio, kia ĝi estis en sia naskiĝjaro. La diferenco estas nur, ke intertempe ĝi estas vivanta lingvo kaj ne plu projekto. Sed la intereso de l'granda publiko kaj de l'aŭtoritatoj ne estas pli granda ol antaŭ cent jaroj, eble eĉ malpli granda — ja la rezistoj estas eĉ pli radikalaj.

2. Diference al 1887, kiam estis pluraj gvidaj mondlingvoj, hodiaŭ unu — la uson-angla — superregas ĉiujn aliajn lingvojn. Ĝi nun estas *la* mond-lingvo, uzata en ĉiuj internaciaj rilatoj praktike ĉie en la mondo. Nenio kaj neniu povas forigi ĉi tiun realaĵon.

3. Estas utopio atendi, ke Esperanto povus anstataŭi la uson-anglan lingvon kiel internacia lingvo. La super-rega rolo de l'uson-angla lingvo daŭre kreskadas, kaj por la novaj generacioj estos memkompreneble, uzi ĝin internacie, lerninte ĝin preskaŭ perfekte en la lernejoj, ĉie en la mondo.

4. Kreskas per la lingvopolitiko, kiu favoras sole la uson-anglan, nova elito ĉie en la mondo, kiu pro la scio de l'uson-angla ne havas internacie lingvoproblemojn. Estas ankaŭ tiu elito, kiu decidas pri la lingvopolitiko. La granda plimulto de l'homaro restas lingvo-proletaro, lerninte ne sufiĉe aŭ tute ne la elitolingvon.

5. La ĝenerala publiko — ankaŭ la lingvo-proletaro — akceptas la fakton, ke la uson-angla estas la internacia lingvo. Ne impresas ĝin la kutimaj argumentoj por Esperanto (neŭtraleco, facileco, egalrajto), ĉar la faktoj konvinkas ĝin centprocente pri nepra bezono de l'uson-angla.

6. Kiun ajn strategion elektas hodiaŭ la Esperantomovado por konvinki aliajn, Esperanto ĉiam aperos kiel konkurenco kaj atako kontraŭ la uson-angla kaj konsekvence kontraŭ la usona hegemonio. Estas ridinde postuli, ke esperantistoj ne batalu kontraŭ ĝi, ĉar vole-nevole ili faras tion jam per la pledo por Esperanto.

7. La fortega pozicio de Usono neniigas la ŝancon de Esperanto reale konkuri kun la uson-angla, ĝenerale. Mondskale ŝanceto ekzistas nur, se evoluantaj landoj (en Azio kaj Afriko) konsciiĝas pri la malavantaĝoj, kiujn ili suferas pro l'uson-angla hegemonio. La forta eŭropa Esperanto-movado do devus multe pli subteni la movadon en tiuj landoj (Ĉinio, Koreio, Oceanio, Afriko kaj parte Sud-Ameriko).

8. En la industri-landoj okcidentaj la Esperanto-movado povas krei specifajn premi-grupojn en tiuj medioj, kiuj malgraŭ la ĝenerala uzado de l'uson-angla havas personajn lingvo-problemojn. La lingvo-proletaro sentas ilin precipe en turismo: turismaj agentejoj, kiuj ofertas specialajn programojn per la avantaĝoj de Esperanto, povus konvinki per praktika utilo tiujn homojn.

9. Prem-grupojn por Esperanto oni krome povas krei ekz. inter studentoj kaj sciencistoj, kiuj konsciiĝas pri sia malfavora pozicio, kiun kaŭzas la [illegible]to ke ili ne havas la uson-anglan kiel gepatran lingvon; inter la homoj, kiuj partoprenas programojn de ĝemel-urbaj agadoj; en hobiaj, sportaj kaj fakaj medioj, kiuj spertas lingvoproblemojn ĉe internaciaj kontaktoj; en junularaj medioj kaj asocioj (Pasporta Servo!); en por-eŭropaj asocioj.

10. La Esperanto-movado ne devas rezigni pri siaj cent-jaraj idealoj de paco, solidareco, egal-rajteco, neŭtraleco ktp., sed ili pli forte ol antaŭe devas ankaŭ krei praktikan utilon por la uzantoj de l'internacia lingvo. Se Esperanto ne baldaŭ donos simile grandajn realajn avantaĝojn kaj utilojn kiel la uson-angla, tiam ĝi ne havos ŝancon, veni el la nuna getto. Kiel ajn konsole estas, ke la centjara Esperanto certe ne plu malaperos kaj ke ĉiu esperantisto jam nun multoble profitas per ĝi, kontentiga la nuna situacio ja ne povas esti. Do ni ĉiuj strebu, plibonigi ĝin!

Stefan Maul (FR Germanio)

Poemaro por paco

Okaze de la Internacia Jaro de Paco, UEA invitis poetojn kaj versamantojn kontribui al tiu ĉi verko, en kiu prezentiĝas 28 aŭtoroj el dek ses landoj — kaj konataj nomoj kaj novaj talentoj. Laŭ Yosimi Umeda, sekretario de la redakta komisiono, "ĉiu verko en tiu ĉi poemaro respegulas tion, ke ni esperantistoj ne plu naivas kredi, ni ja alfrontas aktualajn demandojn ĉiutage."

Poemaro por paco. Pekino: Universala Esperanto-Asocio, 1986. 44p. 18cm. Prezo: 4,50 gld. plus sendokostoj. (Rabato de unu triono por samtempa mendo de minimume tri ekzempleroj.)

Recenzoj

Filozofie valora, sed lingve malglata

Diskurso pri la metodo (1637), Kartezio. El la franca trad. Eugene de Zilah. Chapecó: Fonto, 1985. 176p. 21cm. Biblioteko de filozofio Fonto. Esperanta-franca eldono. Prezo: 16,20 gld.

Malmultaj estas filozofiaj verkoj en nia lingvo. Ĉu la esperantistaro estas ĝenerale nefilozofiema aŭ simple mankas bonaj fakuloj kaj eĉ pli bonaj tradukistoj? Ĉar filozofion traduki estas malfacilega kaj neenviinda entrepreno. Sekve de tio ankaŭ nia lingvaĵo tiukampa estas preskaŭ virga kaj la tradukisto eventuala devus plugi neprilaboritan kampon kaj mem elturniĝi restante en multaj kazoj sen helpo de normo, kutimo aŭ tradicio. Eble tiu situacio komencos ŝanĝiĝi post fondo kaj aktivado de faka filozofia asocio (FAT — Filozofia Asocio Tutmonda), kies vicprezidanto kaj aktivulo estas ankaŭ la tradukinto de la ĉi tie recenzata verko.

Recenzi la verkon de Kartezio mem estus kaj nebezone kaj malmodeste. Paroli pri ĝia influo sur okcidentan civilizon, filozofion kaj sciencon kaj ĝenerale regantan raciismon kaj sciencismon same nebezone. Sed almenaŭ ni diru, ke la ideo krei artefaritan lingvon sen tia pensmaniera fono estus neimagebla. Eble la tuta nia (esperantista) utopiemo konsistas en la utopie troa konfido je racio!

Do, restas komenti la lingvaĵon de la traduko, kaj la eldonon.

La libro estas bone presita kaj bindita, kun malmultaj preseraroj. Krom la Esperanta traduko en ĝi enestas ankaŭ la franca originalo, kio estas ofte helpa en la dubaj kazoj — kaj certe malofte honesta ago de la tradukinto, kiu tiel elmetas sin al eble pli akraj kritikoj. Krome ĉiu paragrafo estas akompanata de ofte tre utilaj kaj kompetentaj komentarioj kaj klarigoj, kiuj povas esti tre utilaj por eŭropanaj nefilozofoj kaj kultura gvidilo por tiuj edukitaj en tradicioj aliaj ol la okcidenta, kio tre gravas por tiuspecaj verkaĵoj en Esperanto. Mi trovas tiujn komentariojn tre valoraj.

Tamen ankaŭ tiel pedanta tradukisto ne sukcesis eviti la damnojn de la lingva virgeco tiukampe. En lia lingvaĵo oni trovas multajn tre originalajn kaj vere kreivajn solvojn, sed ankaŭ multajn nefacile kompreneblajn kombinaĵojn, ĉefe tiujn kun *el-* kaj *de-* kiel pseŭdoprefiksoj, kiuj tro abundas. Iom troa obeo al la franca originalo kaj la (vere specifa) kartezia lingvaĵo kaŭzas konsiderindan nelegeblecon de

la teksto. Kelkajn frazojn oni devas tralegi multfoje por kapti kio estas kio en ili. Enestas ankaŭ kelkaj nepermeseblaj "originalaĵoj" kaj evidentaj eraroj — ĉefe koncerne la transitivecon de verboj, akuzativojn post kelkaj prepozicioj, uzon de *-ig-* kaj simile. Plej stranga mi trovas la uzon de prepozicioj en tiu ĉi traduko. Mia ĉefa impreso pri tiu traduko estas tre ambigua. Oni povus diri, ke la lingvaĵo en tiu verko estas iom nekutima (se ne stranga) — sed aliflanke certe ne malbona (eĉ se en iuj lokoj ĝi ŝajnas esti ne tro sukcesa).

Al filozofiemuloj mi konsilas havi ĉemane la originalon kaj la naciajn tradukojn (mi uzis la kroatan kaj la albanan), ĉar legi tiun ĉi tradukon estas tre lacige kaj peze. Al tiuj, kiuj interesiĝas kiel fleksiĝas Esperanto antaŭ filozofiaj postuloj, mi certe rekomendas studi la tradukon de de Zilah. Pri la maldankemo de sia entrepreno ankaŭ li mem konsciis, kaj ni esperu ke sekvos ankaŭ aliaj tradukoj, eble pli bonaj kaj eble ne tiom entuziasmaj kiel tiu ĉi.

Nikola Rašić (Jugoslavio)

Viv-apuda novelaro

Viro en nigra mantelo kaj aliaj rakontoj, Barbara Sokalówna. Varsovio: Pola Esperanto-Asocio, 1984. 96p. 20 cm. ISBN 83 7013 007 0. Prezo: 9,00 gld.

Jen aro da noveloj kun titolo ne tre alloga. Krom tio, simpla eldonaĵo, kun relative multaj eĉ ĝenaj pres-eraroj. Oni povus fariĝi kolera pro tiom da senzorgo — aŭ oni povus ne plu atenti ĉi tiun verketon... Tamen, malgraŭ ke oni prave rajtas respondecigi la eldonintojn, ke ili ne sufiĉe kontrolis la tekston, se la reago de la publiko estus, ke ĉi tiu novelaro restus nekonata, miaopinie la publiko maltrafus ion signifan, ĉar la aŭtorino (profesia radioparolisto) sukcesis en nur malmulte da paĝoj rekrei vivajn bildojn de homoj plene vivproksimaj. Tiu realeco frapas la leganton eĉ en la pli fantaziaj rakontoj: ekz. pri "La hedero", kiu reguligas la homsorton.

La plej longa peco, "Saskia", prezentas al ni unu virinan vivon tiel tuje rekoneblan, ke estante nederlandano, mi miris, ke verkis ĝin aŭtorino pola. Enestas baraktadoj pri kio estas la celo de la vivo, pri malsano kaj pluvivado, pri geaj rilatoj kaj eksedziĝo — nu, verŝajne ĉiu kulturulo rekonos sin mem.

Postparole, s-ino Sokalówna sugestas al ni, ke ŝia prozo ŝajne kongruas "kun romantikaj tendencoj, renaskiĝantaj en la nuntempa mondo, en la homa penso". Kelkaj ĝin nomas "tipe virina"; mi prefere nomas ŝian verkadon "viv-apuda": ŝi pentras precipe virinojn tiaj, kiaj ili estas en la nuno.

Gerrit Berveling (Nederlando)

Periferia perspektivo pri aktualaj temoj

Dilemoj de la nuntempo — vide el Hungario, red. Sándor Révész. Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, 1984. 102p. 21cm. ISBN 963 571 081 X. Prezo: 12,00 gld.

Kiam dilemoj videbliĝas en bazaj kampoj de la homa kunvivado kiel socio, ekomomio kaj komunikado, tiam ekzistas objekto por interesaj eseoj. La hungaraj eldonintoj elserĉis tiklajn temojn kaj kunmetis ses artikolojn el la jaroj de 1978 ĝis 1982 kiel tradukaĵojn en tiun ĉi libron ("ĉi libron" ili mem dirus, kiel ĝenerale en tiu traduko).

La pritrakto de *sociaj* kondutoj baziĝas sur la teorio pri ludoj kaj volas helpi prognozi kio estos. Koncerne *komunikadon,* tri verketoj priskribas ĝiajn efikojn: socia komunikado kaj kulturo, valoro de informoj, informoj kaj socio. En tiu branĉo de scienco kaj sinteno okazas rapidaj ŝanĝoj kaj novaj konstelacioj. En la kampo de *ekonomio* la temaro rangas de hungara planado ĝis mondekonomio.

La artikoloj limiĝas al la situacio en Hungario aŭ al mondaj aferoj vidataj el tiu ĉi lando (la libro-titolo mem diras: "vide el Hungario"). En sia antaŭparolo la redaktinto Sándor Révész elstarigas la specifecon de sia lando: periferia, prisilentata en la ŝtormaj interparoloj de la granduloj. Tian staton de io pasiva en la monda evoluo havas multaj landoj, kio ĝeneraligas la prezentitan starpunkton en la libro.

La lingvaĵo estas glata kaj klare komprenebla, kio en kazo de faka libro estas laŭdo. Bedaŭrinde la tradukintoj ne evitis la modon mem enkonduki novajn vortojn en Esperanton, eĉ se nur kelkajn. Superflue estas, ekzemple, ekuzi "liciti" por "proponi (sumo en aŭkcio)". La germana ne posedas apartan vorton por tiu ĉi ago kaj tamen estas esprimriĉa.

Tre simila problemo estas la alpremo de novaj sencoj en kutimajn Esperanto-vortojn. Uzi la esprimon "sapo-opero" (ne novvortoj!) necesigas klarigi tiun usonismon. Spektantoj de usona televido ĉie en la mondo, kie ĝi ja estas disvastigita, scias pri kio temas, sed restas la demando, ĉu nun Esperanto devas transpreni tion. Mi kontraŭas.

La nomoj de personoj en la teksto ĉie ĉehavas parenteze la skribmanieron en Esperanto kaj tiel prononcklarigon. Tiu afabla zorgado pri la leganto karakterizas la tutan libron. Kaj ĉar ĝi traktas interesaĵojn malofte renkontitajn en la Esperanto-libromerkato, ĝia apero estas tre bonvena.

Werner Bormann (FR Germanio)

72a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO, Varsovio (Pollando), 25a de julio — 1-a de aŭgusto 1987.
Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.
Adreso de LKK: p/a Pola Esperanto-Asocio, Jasna 6, PL-00-013 Warszawa 1, Pollando

Dua Bulteno: La 22an de marto aperis 48-paĝa, riĉe ilustrita *Dua Bulteno* de la 72a UK, kun bela, multkolora kovrilo. La tradicia kongresa broŝuro enhavas ĉiujn esencajn detalojn pri la loĝado, ekskursoj, vizoj, antaŭ- kaj post-kongresaj aranĝoj, Infana Kongreseto, Internacia Junulara Kongreso ktp. Al la utilaj informoj pri la kongresaj lando kaj urbo, aldoniĝis ankaŭ adreslistoj de la polaj ambaoj kaj konsulejoj, samkiel de la oficejoj de la kongresa vojaĝagentejo Orbis. La bultenon akompanas tri ampleksaj mendiloj, kiujn la kongresanoj resendos al la konstanta adreso en Roterdamo. La bulteno ekspediĝis aerpoŝte tra Londono, kaj ĝi devus atingi ĉiujn aliĝintojn dum la unua semajno de aprilo.

Loĝado: La kongresanoj estas petataj strikte observi la limdaton kaj sendi siajn loĝmendilojn, tiel ke ili atingu la Centran Oficejon de UEA plej malfrue la 30an de aprilo. Ĉar la Kongreso minacas fariĝi vere mamuta laŭ sia grandeco, lastmomentaj improvizoj precipe pri la loĝado praktike ne estos eblaj, ĉar ni jam okupas la tutan disponeblan hotelkapaciton de la kongresa urbo.

Interkona posttagmezo: Anstataŭ la tradicia interkona vespero, oni en Varsovio planas novstilan aranĝon, kiu ebligos ne nur konatiĝon inter la kongresanoj sed ankaŭ ilian miksiĝon kaj konatiĝon kun varsovianoj. Temos pri Interkona Posttagmezo, sur la granda placo antaŭ la kongresejo, de la 15a ĝis la 22a horo. Por tiu okazo la placo transformiĝos en subĉielan foirejon, kun multaj budoj, kun scenejo por varsoviaj kaj alilandaj artistoj, kun vendistoj, promenantoj, esperantistoj kaj neesperantistoj, kongresanoj kaj nealiĝintoj. Funkcios dume la akceptejo en la Palaco, la restoracioj kaj bufedoj tie; pluraj aliaj salonoj estos malfermaj por retiriĝi de la foira bruo kaj trankvile ripozi aŭ konversacii kun novaj kaj malnovaj geamikoj.

Komitato de UEA: Kun la ideo liberigi la kongresan programon de la kunsida pezo, kiun al ĝi donas i.a. la komitataj kunsidoj, estas decidite, ke la komitato de UEA kunsidos ĉefe antaŭ la oficiala komenco de la kongresaj aranĝoj. La kunsidoj okazos ekde la 23a de julio (ĵaŭdo) je la 10h30 ĝis la 18h30 en sabato la 25a de julio. Kompreneble, dum la kongresa semajno okazos la ĝenerala kunsido en kiu la Komitato traktos publike la Estraran Raporton. Kiel sciate, ĉiuj komitataj kunsidoj ja estas publikaj, kaj tiuj kongresanoj, kiuj frue atingos Varsovion estas bonvenaj observi la laboron de la Komitato.

Internacia Kongresa Universitato: Prof. Juan Régulo-Pérez (Hispanio) estos Rektoro de la duoble jubilea IKU, kiu en Varsovio havos sian 40an sesion. La Estraro jam akceptis 11 prelegojn proponitajn al la koncerna komisiono, sed ĝi nun provas grandigi tiun nombron, ĉar 11 prelegoj ne sufiĉas por la multmila kongresa publiko.

Kongresa libro: Pro la grandeco de la Kongreso kaj adresaro de ties partoprenantoj, la *Kongresa libro* aperos en du volumoj (kiel en Budapeŝto en 1983). La unua parto enhavos ĉiujn programdetalojn kaj aperos komence de junio, por poŝte distribuiĝi al ĉiuj kongresanoj. La dua parto, kiu enhavos la kongresan adresaron, aperos ĝustatempe por distribuiĝi kun la aliaj kongresaj dokumentoj ĉe la alveno en Varsovio.

Kongresa
BUDAPESTA INFORMILO
68-a UK · BUDAPESTO · KONGRESA ELDONO
NOVAJ PAŜOJ AL ESTONTO
GAZETAR
LA TOTEMO
KANADA INFORMILO
69-a U.K. VANKUVERO
LA STROBILO
KONGRESA KURIERO DE L' 70a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO EN AUGSBURG 1985
STROBILO
AL LA NOVA ETAPO
KONGRESA KURIERO DE LA 71-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO EN PEKINO 1986
Honore al Niaj Kongresaninoj
Informkunsido pri la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS)
Atentu:

Kongresa kuriero: La ĉiutaga kongresa gazeto aperados en Varsovio sub la redakto de Gian Carlo Fighiera, iama kongresa sekretario de UEA (ankaŭ en Varsovio en 1959), nun funkciulo de Monda Organizaĵo pri Turismo en Madrido. Tiu siaspeca lukso havi ĉiutagan gazeton de la Kongreso komenciĝis en Ateno en 1976 kaj evoluis de stencilita bulteno ĝis bela presita ĵurnalo, kiel en la Kongresoj de Antverpeno, Budapeŝto, Vankuvero, Aŭgsburgo kaj Pekino.

Felice Bertoletti forlasis nin

Felice Bertoletti, konsilanto de Itala Esperanto-Federacio, estis dum multaj jaroj delegito de UEA kaj aktivis en Milana Esperanto-Klubo dum pli ol 50 jaroj.

Al Esperanto li alproksimiĝis junaĝe kaj tuj li ĝin praktikis en la korespondado kun eksterlandanoj: sperta leter-amiko, li ofte pri tio parolis al la milanaj klubanoj kaj al kurso-vizitantoj por konvinki ĉiujn, ke Esperanto estas ĝusta ilo por malfermi al si la vojon al kontaktoj kun la tuta mondo.

Al li plaĉis rakonti pri la unua sperto, kiel aktoro: dum la Universala Kongreso de 1935 en Romo, li rolis en la komedio de Goldini **Kurioza okazaĵo,** kiun esperantigis "Mevo" (pseudonimo de Rinaldo Orengo). La reĝisoro estis tiam Julio Baghy.



La dua mondmilito haltigis la agadon de la movado en Milano, sed tuj poste, sin ŝarĝante per la heredaĵo de la pioniroj Paolo Meazzi, Ippolito Piatti, Giovanni Tanzi, Bertoletti fariĝis ĝia motoro. Li komprenis, ke oni bezonas ion novan por progresigi la movadon: profesiulo en la industria mondo, li iniciatis la starigon de "Centro por Esperanto en Komerco, Industrio kaj Turismo" (CEKIT): la celo estis informi pri la industriaj kaj komercaj entreprenoj uzantaj Esperanton kaj helpi la kontaktojn inter ili.

Kiel gvidanto de la Milana Klubo kaj de CEKIT, kiel regula partoprenanto en la kongresoj, li akiris grandan sperton, kiun li metis je dispono de la Itala Esperanto-Federacio kiam pro pluraj kauzoj ties sidejo ne plu povis resti en Torino. La itala esperantistaro decidis, ke la nova sidejo estu CEKIT, en Milano, kaj ke Felice Bertoletti gvidadu la sekretariejon kun la helpo de samideanino Antonietta Gaio.

Kun granda sindediĉo li surprenis la novan taskon, kaj krom tio, li trovis ankau la fortojn por zorgi pri Esperanto-stando ĉe la foiro de Milano kaj por kontribui je la laboro de la Esperanta eldona kooperativo (CoEdEs) organizante la vendadon de la libroj.

Modesta en ĉia okazo, li estis ĉiam preta labori por Esperanto, kiam prezentiĝis la okazo: li estis praktika homo, kiu tamen atentis ĉiujn detalojn. Helpema li estis. Li ne pretendis dankojn nek rekonojn kiam li donis sian tempon ĉu kiam malavare li elspezis sian monon por la lingvo internacia.

Sed tio, kion li faris, ne estis por li sufiĉa: tro multe li amis Esperanton kaj sian urbon kaj pro tio lia sekreta deziro estis organizi Universalan Kongreson en Milano. Nacian Kongreson organizi en tiu urbo ne estis oportune, ĉar ĝi ne estus havinta grandan propagandan efikon, kaj pro tio li multe agadis por la okazigo de kongreso en San Pellegrino. Post la kongreso li firme kredis, ke oni devas konvinki la italan esperantistaron kaj Universalan Esperanto-Asocion, ke Milano indas esti sidejo por kunvenigi oficiale la tutmondan samideanaron.

Li estis tia homo, ke li neniam serĉis honoron, sed eventuale laboron kroman.

La malapero de Felice Bertoletti lasas grandan malplenon en la itala movado kaj verŝajne kun li ankau malaperis la espero de la milana Universala Kongreso. Li mortis la 18an de septembro 1986. Li estis ekzemplo de modesteco, de senlaciĝemo pri efika aktivado, daura kaj utila ne nur por la italaj sed por la esperantistoj de la tuta mondo. Li longe loĝadu en nia memoro kaj en niaj koroj.

Nicola Minnaja

Ĉi tiu paĝo estas pagita de Itala Esperanto-Federacio

Antologio de maltaj poetoj, trad. kaj red. Carmel Mallia. Żabbar: la tradukinto, 1985. 168p. 21cm. Poemkolekto donanta superrigardon pri la plej elstaraj maltlingvaj poetoj, kun informaj komentarioj de la tradukinto. Prezo: 17,70 gld.

Bagasejo, La (1928), José Américo de Almeida. El la portugala trad. Geraldo Mattos. Chapecó: Fonto, 1985. 176p. 21cm. Fonto-Serio n-ro 14. Historie grava romano pri la vivo en la nordoriento de Brazilo. Prezo: 19,80 gld.

Baza legolibro por komencantoj, red. Vilmos Benczik. Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1986. 117p. 20cm. Kompilaĵo de 36 mallongaj legaĵoj verkitaj surbaze de la oftec-grupoj de la Baza Radikaro Oficiala, kun kvinlingva vortareto pri ĉiuj radikoj (en angla, germana, hungara, pola kaj rusa). Prezo: 13,80 gld.

Bazoj por via konduto, Carlos Bernardo González Pecotche (Raumsol) (1901-1963). Trad. José Dutra Mendes kaj Paulo Amorim Cardoso. San Paŭlo: Logozofia Eldonejo, 1986. Konsi- ĵ al la junularo laŭ logozofia mondkoncepto. Prezo: 6,90 gld.

Beethoven: La Testamento, trad. Walter Klag. Vieno: la tradukinto, 1986. 4p. 21cm. En koverto, 23 cm. Kun klarigoj kaj gvidfolio al viena Beethoven-ekspozicio. Prezo: 1,50 gld.

Bosniaj elegioj, Ranko de Risojević (1943). El la serbokroata trad. Vesna Skaljer-Race. Banja Luka: Komununa organizo de Esperanto-junularo, 1986. 48p. 22cm. Ilus. Omer Berber. Modernstila poemaro inspirita de la historio kaj kulturo de Bosnio. Prezo: 12,00 gld.

Botel-diableto, La, Robert Louis Stevenson. Trad. Ergoto de Bonaero. Buenos Aires: Argentina Esperanto-Instituto, 1986. 72p. 17cm. Mimeo. Broŝ. Traduko de fama rakonto de la skota literaturisto. Prezo: 7,50.

Cigno-kanto, Franz Schubert (1797-1828). Trad. Mad Mevo. 15p. 15cm. Mimeo. Broŝ. Tradukoj de 14 kantoj konsistigintaj la lastan ciklon de la komponisto. Sen muziknotoj. Prezo: 6,90 gld.

En la mirinda mondo de la kino, Donĉo Ĥitrov. Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1985. 212p. 16×22cm. Ilus. Rakontoj pri personaj spertoj en la kinoarto, celitaj por junuloj kaj tradukitaj el bulgara originalo de la aŭtoro mem. Prezo: 7,50 gld.

e i o u de la Internacia Lingvo, José Anó Belda. Valencia: ancisco Javier Anó Belda, 1986. 60p. 30cm. Ilus. Rektmetoda lernolibro por infanoj, kun hispanlingva antaŭparolo. Prezo: 15,00 gld.

Esperanto: sa dvostrukim rečnikom, Jovan Janković. Niš: Vuk Karadžić, 1986. 64p. 20cm. Kurso por komencantoj. Prezo: 6,60 gld.

Filozofio zoologia (1809), Lamarko (1744-1829). El la franca trad. Valo. Laroque: SAT-Broŝurservo, 1987. 137p. 21cm. Mimeo. Traduko de la plej grava antaŭdarvina verko pri biologia evoluo. Prezo: 9,00 gld.

Kaj poste, Daphne Lister. Manĉestro: Esperantaj Kajeroj, 1986. 56p. 14,5cm. ISBN 0 9505323 5 5. Dua originala poemaro. Prezo: 6,60 gld.

Konflikto, La, F. Le Dantek, el la franca trad. E. Lanti, kaj **Dubi kaj aliaj artikoloj,** Alen, el la franca trad. Herezulo. Laroque: SAT-Broŝurservo, 1987. 136p. 21cm. Mimeo. Diskuto pri la respektivaj meritoj de religio kaj ateismo por kompreni la mondon. Prezo: 9,00 gld.

Kiel diri...?: Praktika Esperanta frazeologio, Lentaigne. Laroque: Cercle espérantiste de l'Agenais, 1987. 148p. 21cm. Represo de la kvinmilvorta laŭtema frazaro. Prezo: 10,50 gld.

Kritikaj studoj defende de Esperanto, Ivo Lapenna. Kopenhago: Internacia Centro de la Neŭtrala Esperanto-Movado, 1987. 60p. 30cm. Kolekto de kvar kritikaj eseoj pri verkoj de J.V. Stalin, W. Solzbacher, Detlev Blanke kaj Peter G. Forster. Prezo: 22,80 gld.

Kurso pri rapida legado, Christian Bertin. Cesson-Sevigne: La aŭtoro, 1986. 114p. 30cm. Bele prezentita kun multaj ekzercoj. Prezo: 18,00 gld.

Malgranda Johano, La, Frederik van Eeden (1860-1932). El la nederlanda trad. Rejna de Jong. Chapecó: Fonto, 1986. 142p. 21cm. Fonto-Serio n-ro 13. Klasika psikologia fabelo pri maturiĝo de infano. Prezo: 13,80 gld.

Meteologia observatorio sur la monto Sonnblick, La, Walter Klag. Vieno: la aŭtoro, 1986. 8p. 30cm. Prezo: 2,10 gld.

Napravljenija sovremennoj interlingvistiki, S.N. Kuznecov. Moskva: Universitet druĵbij narodov im. Patrisa Lumumbij, 1984. 99p. 21cm. Pri tendencoj en la nuntempa interlingvistiko. Prezo: 9,00 gld.

Nia lando Pakistano, Saeed Ahmad Farani. Jhelum: Esperanto-Akademio, 1986. 34p. Ilus. 21cm. Mimeo. Pri geografio, historio kaj kulturo de Pakistano. Prezo: 3,00 gld.

Nigra Spartako, La (1955), Geraldo Mattos. Chapecó: Fonto, 1986 (dua eldono). 56p. 21cm. Fonto-Kajeroj n-ro 1. Originala romaneto pri koloniigo de afrika regiono. Prezo: 6,00 gld.

Nova testamento de nia Sinjoro kaj Savanto Jesuo Kristo, La. Londono: Brita kaj Alilanda Biblia Societo, 1986. 358p. 13cm. ISBN 0 564 02688 3. Poŝformata eldono (13×8cm). Prezo: 6,00 gld.

Pri karboksilo, karboksaco kaj karboksato, M.T. Popov. Gundelfingen (FRG): G. & M. Westermayer, 1986. 8p. 21cm. Prezo: 1,50 gld.

Promeso de monda paco, La, Universala Domo de Justeco. Antverpeno: Bahaa Monda Centro, 1985. 21p. 21cm. Broŝ. Bahaaj kredoj pri paco en la hodiaŭa mondo. Prezo: 1,50 gld.

Serĉu mian sonĝon, István Nemere. Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1987. 171p. 20cm. Romano de la populara verkisto pri juna geedza paro, kies amiko montriĝas esti teroristo. Prezo: 18,00 gld.

Sprog og sprog imellem, Preben Bagger. Skelby: Forlaget Komunikation og Kultur, 1986. 142p. 21cm. ISBN 87 87508 12 5. Danlingva prezento de la Esperanto-komunumo kiel modelo de egaleco en interkultura komunikado. Valora verko kun moderna aliro al la temaro. Prezo: 27,90 gld.

Stafeto-libroj, La, Reinhard Haupenthal. Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1986. 20p. 21cm. Katalogo de la eldonaĵoj de la plej grava postmilita Esperanto-eldonejo kun represo de *Babilo pri Stafeto* (1957) de J. Régulo Pérez. Prezo: 6,60 gld.

Ŝuisto de Gwidel, La, Erwan ar Menga. Saint-Brieuc: Les Presses Bretonnes, 1986. 92p. 21cm. Ilus. Rakonto laŭ la bretonaj legendoj. Prezo: 9,60 gld.

Terminologia kurso, Jan Werner. Roudnice n.L.: Sdruženy klub ROH, 1986. 88p. 21cm. Sistema, rigore scienca enkonduko en terminologion. Prezo: 12,00 gld.

Terminologia vortaro, Rüdiger Eichholz (1922). Bailieboro: Esperanto Press, 1986. 50p. 29cm. ISBN 0 919186 31 9. Provtraduko de la *Rekomendo 1087 de ISO* kun aldonaj anglaj, francaj kaj germanaj terminoj kaj traduko de la *Labordokumento: Reviziita versio de ISO 1087* kun ties angla versio. Prezo: 7,50 gld.

Ventolume, Debora Vaarandi (1916). El la estona trad. Hilda Dresen, Salme Kärner, Jaan Ojalo, kun enkonduka eseo de Karl Maru. Tallinn: Eesti Raamat, 1986. 142p. 16cm. Ilus. de Tiiu Allikvee. Kolekto de la plej grava estona poetino postmilita. Prezo: 4,20 gld.

Vetero kaj klimato de la mondo (1974), Denis Riley kaj Lewis Spolton. El la angla trad. Kris Long. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 1987. 132p. 25cm. Ilus. ISBN 92 9017 035 2. Renoma popularscienca verko, riĉe ilustrita. Prezo: 28,50 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti, ke al ĉiuj netaj prezaj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 6&, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 20& por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10& por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 5 gld. Antaŭdankon pro via mendo!

RONDO

● **Sovetunio:** Eldonejo Mokslas, Litova SSR, ĵus eldonis la libron *Esperanto tarptautine kalba* de L. Skupas. Temas pri informlibro pri la lingvo, historio kaj kulturo de Esperanto kun specimenoj de Esperanta beletro en litova traduko. La libro aperis en 25 000 ekzempleroj.

● **Israelo:** En februaro aperis en Telavivo la hebrea traduko de *Sep fratoj,* verko eldonita en Esperanto en 1947. La originala romano estas ĉefverko de la finna aŭtoro Aleksis Kivi (1834-1872). Ĝin tradukis en Esperanton Vilho Setälä, kaj el Esperanto en la hebrean Itamar Even-Zohar, profesoro pri literaturo en la universitato de Telavivo. Pro la eldono oni intervjuis prof. Even-Zohar en la israela radio kaj en la populara ĵurnalo *Jediot Aĥaronot,* kaj li substrekis la utilon de Esperanto kiel perilo inter la "malgrandaj" lingvoj.

● **Svislando:** D-ro Arthur Baur disponas pri kopioj de verko sia pri la nova, unueciga skribolingvo ellaborita por la romanĉa — oficiala lingvo de Svislando tamen parolata de nur iom super 50 000 homoj. La originala teksto aperis en *Serta gratulatoria,* vol. 1 (vd. "Régulo"). Sendu 6 svisajn frankojn aŭ egalvaloron al la aŭtoro ĉe Herrenbergstr. 5, CH-8006 Zürich.

● **Ebura Bordo:** Tri membroj de la ĵus oficialigita asocio EBEA — Hyacinthe Seka, Antoine Kouassi kaj Venance Zeba — preparis koncizan diapozitivan programon pri "La Lobi-altaroj". La 12 lumbildoj kun teksto prunteblas ĉe Hans Bakker, Kastelenstraat 231, NL-1082 EG Amsterdam, por uzo en klubaj vesperoj.

● **Bavario:** Bavara Esperanto-Ligo aperigis en sia bulteno *Esperanto en Bavario,* n-ro 1/1987, galerion de 72 fotoj pri la Esperanto-pioniroj vivantaj ĉirkaŭ la jarcentŝanĝo — inkluzive de Kabe, Grabowski, Hodler, Privat kaj multaj nun preskaŭ forgesitaj. Mendu ĉe Bayerische Esperanto-Liga e.V., Seitzstr. 14, D-8900 Augsburg, FR Germanio, kontraŭ 3 irk-oj.

● **Nov-Zelando:** Dum Eŭropo kaj aliaj nordhemisferaj landoj frostis meze de vintro, novzelandanoj komencis la Jubilean Jaron per nacia kongreso en Masterton, de la 8a ĝis la 13a de januaro. Oni aparte zorgis pri plialtigo de la lingva nivelo de la partoprenantoj, i.a. per Esperanta komentario okaze de vizito al centro pri tiu sovaĝa naturo, kiu tiel famigis la landon en la cetera mondo. Kontribuis al la programo John kaj Helga Rapley, kiuj antaŭnelonge translokiĝis al Nov-Zelando post kelkjara laborado en la Centra Oficejo de UEA.



● **Vjetnamio:** Ngô Chân Lý informas, ke dum la pasinta jaro li instruis Esperanton al entute 375 vjetnamaj kaj 25 kampuĉiaj gejunuloj ĉe la ŝtata junulara kulturdomo en Hô Chí Minh, kaj kvarfoje prelegis tie al neesperantista aŭskultantaro. Li planas eldoni Esperanta-vjetnaman vortaron por la Jubilea Jaro.

Fake

● **Radio-aŭskultantoj:** Radio Pekino, kiu ĉi-jare festas sian 40-jaran datrevenon kaj la 22an jaron de siaj Esperantaj elsendoj, invitas siajn diverslandajn aŭskultantojn sendi konkursaĵojn pri la temo "Mi kaj Radio Pekino". Prozon, poemon, pentraĵon, foton ktp, rakontantan pri viaj impresoj kaj deziroj, sendu al Radio Beijing, Esperanto-fako, Beijing, Ĉinio.

● **Paco:** Distrikta junulara sekcio de la Esperanto-asocio de Germana DR invitas al internacia arta konkurso, okaze de renkontiĝo en aŭgusto 1988 de la pionir-organizaĵo "Ernst Thälmann". Infanoj ĝis 14 jaroj ricevas temon "Ni infanoj ŝatas la pacon", dum pli aĝaj homoj verku pri "Konservu la pacon por infanoj". Ĉiuspecajn artverkojn — pentraĵojn, skulptaĵojn, fotojn ktp — sendu ĝis la 15a de aprilo 1988 al Christian Papenmeier, Junulara Sekcio Karl-Marx-Stadt de GDREA, Obere Hauptstr. 104, DDR-9156 Oelsnitz. Nepre aldonu precizan adreson kaj naskiĝdaton!

● **Bibliotekoj:** Lastatempe la Centra Oficejo ricevis katalogojn de du sufiĉe grandaj Esperanto-bibliotekoj. Tiu de la Biblioteko "Ramon Molera Pedrals" en Barcelona, Hispanio, haveblas de Palau 17, E-08180 Moia (Barcelona); ĝi ampleksas pli ol 3 000 erojn. Tiu de la Urba Biblioteko de Toronto, Kanado, haveblas senpage de ĝi ĉe 789 Yonge St., Toronto, Ontario M4W 2G8. Menciu nian revuon en via letero!

● **Teatro:** La konkurson pri teatraĵo de Esperantista Verkista Asocio partoprenis 14 aŭtoroj el Britio, Ĉinio, Hungario, Jugoslavio, Francio, Rumanio, Pollando, Sovetunio kaj Svedio. La ĵurio de EVA (Duc Goninaz, Nervi, Gregor) esprimis ĝeneralan malkontenton pro la malalta lingva kaj teatra nivelo de la konkursaĵoj — kiuj ofte ne rilatis al la preskribita temo "La unuaj jaroj de Esperanto" — tiel ke unua premio ne aljuĝiĝis. Duan premion gajnis *Zamenhof private* de Stefan MacGill (Hungario), kiun verkon oni cetere proponos por prezentado dum la 72a UK.



● **Haitio:** Jen la forgesita bildo el la februara "Anoncetoj"-paĝo, kiu montras parton de la grupo de lernantoj en la haitia ĉefurbo; meze Emmanuel Gouthier kaj Eugene Mustea (vd. *Esperanto* 1986/p.216 kaj 1987/p.40).

● **Sciencistoj:** Estas rimarkeble, ke la bulgara Esperanto-movado trovis pli vastan eĥon inter sciencistaj rondoj ol sukcesis aliaj landaj movadoj. Ekzemplo de tio estas la Scienca Instituto por Konservo de Fruktoj kaj Legomoj en la urbo Plovdiv, kie jam fondiĝis Esperanto-societo kaj de kelkaj jaroj okazas regula kurso. Maria Taŝeva raportas, ke la Plovdiva Supera Instituto pri Nutraĵ-Gustaĵa Industrio baldaŭ sekvos saman vojon. Ĉu en aliaj landoj oni konas similajn disvolviĝojn?

● **Filatelo:** Povas esti, ke sur kovertoj ekspeditaj el nia oficejo en la venontaj monatoj troviĝos la jena poŝtstampo — nun uzata en Amsterdamo kaj Utrecht, poste en Hago—Roterdamo.

● **Instruado:** Dum la lasta jaro Zlatko Tišljar instruis Esperanton al klaso de 12-13-jaruloj en Zagrebo, Jugoslavio, kiel publika eksperimento por montri la atingeblan lingvo-nivelon. En kursfina ekzameno observata de lernejaj inspektoroj k.a., la infanoj — eĉ la malbonaj lernantoj — montris sin kapablaj paroli pri hazarde elektita temo dum 4 minutoj, dirante inter 10 kaj 16 frazojn.

● **Pedagogio:** Aperis Esperanta traktaĵo pri instrumetodo por fremdaj lingvoj, nomata "esplor-kreiva vojo". La metodo emfazas iniciatemon kaj esploremon ĉe la lernantoj. Interesatoj kontaktu Oene Hoekstra ĉe Frederikslaan 47, NL-1871 SB Schoorl, Nederlando.

● **Lingvistoj:** La Centra Oficejo antaŭnelonge ricevis la jenan tekston: "Ni, la membroj de Lingvistika Societo de Usono, gratulas la Esperanto-movadon okaze de ĝia centjara datreveno, pro ĝiaj atingoj pliproksimigi la popolojn de la mondo." Aprobis ĝin la 60a Jarkunveno de la Societo. Fine de 1986 la Usona Asocio pri Modernaj Lingvoj organizis sesion pri Esperanto kadre de sia konferenco en Novjorko, en kiu prelegis doktoroj Lieberman, Manson kaj Tonkin.

● **Historio de Esperanto:** Fondiĝis en Britio gvida komitato de (provizore nomita) Esperanta Historio-Societo, kiu celas la elfosadon kaj utiligon de taglibroj, protokol-libroj, leteroj k.s. pri la frua historio de Esperanto. Oni ankaŭ projektas eldoni revuon pri la sama temo. Informoj kaj membriĝo haveblas de Hilary Chapman, 34 Llwyn Estyn, Deganwy, Conwy LL31 9RA, Britio.

● **Fonduso poŝtmarkoj:** Kamil Perlman el Israelo, proprainiciate, antaŭ nelonge aliĝis al tiuj, kiuj regule sendas uzitajn poŝtmarkojn al UEA. Ni tre dankas pro tiu subtenado!

Personoj

● **Régulo:** La 4an de februaro en Tenerifo, Kanariaj Insuloj, la rektoro de la universitato en La Laguna prezidis ceremonion honore al prof. Juan Régulo Pérez. La okazo estis ekapero de la unua volumo (el entute kvar) de la verko *Serta gratulatoria in honorem Juan Régulo*. Tiu 766-paĝa volumo dediĉiĝas ekskluzive al filologio, entenante erojn de 65 aŭtoroj en 13 lingvoj (inkl. Esperanton). La sekva dediĉiĝas al Esperanto mem, kaj oni esperas prezenti la unuajn ekzemplerojn kadre de la UK en Varsovio (kie, cetere, prof. Régulo oficos kiel rektoro de la Internacia Kongresa Universitato).

● **"Paco kaj Justeco":** Tiel nomiĝas Esperanto-grupo en Bruĝo, Belgio, kiu la 21an de marto festis triopan kvindekjaran datrevenon. Ne nur jubileas la klubo, sed ĝia prezidanto F. Roose kaj ĝia sekretario R. Iserentant festas kvindek jarojn en siaj respektivaj postenoj — sufiĉe miriga atingo!

KOKO, Internacia Naturprotektada Asocio de Esperantistoj, ofertas al vi siajn publikaĵojn kaj aranĝojn: *Ekoperanto,* trionjara gazeto por naturprotektado; *Jarlibro,* ekskluziva artikolaro por naturprotektado kaj pri ties natursciencaj kaj sociaj aspektoj; Naturamika Tendaro '87 inter la 10a kaj 17a de aŭg.; Ekologia Konferenco kun ankaŭ ne-Esperantaj organizaĵoj. Informoj: R. Baross, Balzac u. 11, H-1136 Budapest, Hungario.

Anoncetoj

Tarifo: *Ĉiu vorto kostas unu guldenon (unu internacian respondkupon). Pri la enhavo de la anoncetoj kaj anoncoj ne respondecas la redakcio. Ni donas nenian rabaton pro la aperigo de anoncetoj. Por la tarifo de anoncoj bonvolu vidi la duan kovrilan paĝon.*

Kvara milo de "kiel diri" (Lentaigne): 5 000 Esperantaj esprimoj. Ĉe UEA kaj "Esperanto", F-47340 Laroque, Francio.

S-ro Lawrence Mee ŝanĝis sian adreson: 19 Cranburry Road, Eastleigh SO5 5HB, Britio.

Premiojn ricevos ĉiu, kiu kontribuos al kontraŭmilita, kontraŭalkoholisma ekspozcioj per minimume 10 afiŝoj (neĉifitaj) plus eventualaj bildkartoj, poŝtmarkoj, insignoj, magazinoj, pentraĵoj k.a. Esperanto-klubo, ab. ĵas. 393, SU-344007 Rostov-Don-7, Sovetunio.

Internacia servo adresara "Feliĉa Estonteco" celas helpi homojn solajn kaj timemajn. Sendu foton, detalojn pri aĝo, religio, profesio ktp kaj kvalitojn serĉatajn en partner(in)o, kun du bildkartoj kaj unu irk al ISA "Feliĉa Estonteco", Rysard Stempién, str. C. Skoldowskiej 9, PL-59-840 Zawidow, Pollando.

Pri komputilscienco kaj diversaj temoj deziras korespondi tutmonde 30-jara f-ino Afsane Motamedi, Sharara, R. Kajvan, Kushk Buildings, Block 11 no. 343, 14-449 Tehran, Irano.

Almanako Lorenz 1987 — filozofio, scienco, religio, transmondo, cismondo. Spirite Eldona Societo F.V. Lorenz, Caixa Postal 3133, 20001 Rio de Janeiro, Brazilo.

Ĉiu Esperanto-grupo — loka, nacia, faka, profesia — bonvolu sendi vian eldoneĵon por nia nacia J-E-ekspozicio! Nepre helpu flirtigi la verdan stelon en la usona Kapitalo! Esperanto-Societo de Vaŝingtono, c/o 20008-4204 Usono.

25-jara Esperanto-instruisto deziras korespondi tutmonde pri Esperanto-literaturo, tradukarto, muziko, Esperanto-instruado. Ankaŭ kolektas Esperantajn librojn, poŝtmarkojn, monerojn. S-ro Wang Xigen, Anhui-a Esperanto-Kolegio, Anhui Shijieyi Zhuanke Xuexiao, Hezuohua Lu, Hefei, Ĉinio.

Esperanto-klubejo inaŭgurota! Por veki intereson inter la loĝantaro bonvolu sendi salutojn, bildkartojn kaj ĉion eblan por aranĝi ekspozicion (ĝis la 1-a de majo). Ni respondas al ĉiuj: Esperanto-klubo, "Tolbuhin" 45, BG-8800 Sliven, Bulgario

Adreŝanĝo Rossetti. Ekde 1 majo 1987: 40 Solent Way, Gosport PO12 2NS, Britio.

Irana komencanto deziras korespondi kun esperantistoj de la mondo pri vivo, kulturo kaj amo: M. Taran, Serahe dolat-abead, Kh. Ghannad, K. Rangi, K. Valfagre-2, Samte rast, Dare akhar, 31356 Karaj, Irano.

Deziras korespondi pri turismo, literaturo, arto, muziko kaj filmo 25-jara laboranto en eldonejo: Alicja Strzelecka, str. Swoboda 26/1, PL-60-391 Poznań, Pollando.

Inĝ. Kees Ruig (Amstelveen, Nederlando) transloĝiĝis al nova adreso: Groesbeekseweg 53, NL-6581 BJ Malden, Nederlando, tel. +31 80 580 320.

Nova Esperanto-grupo de 15 lernantoj serĉas kontaktojn kun similaj liceaj kursoj aŭ klasoj en aliaj landoj: s-ro Jean-Pierre Denis, College William Ponty, 05 B.P. 671, Abidjan 05, Ebura Bordo.

Kun celo eldoni bulgarlingve originalajn Esperanto-verkojn (poezion kaj prozon) laboras poeto-tradukisto Nikolao Straŋganski, Pk. 22 Presse centre, Slânĉev Brjag, BG-8240 Bulgario.

Esperanto-Societo Kebekia urĝe petas florajn bildkartojn por ekspozicio en la Montreala Botanika Ĝardeno, la 3a plej granda en la mondo. La dek kontribuantoj kiuj sendos plej multe ricevos premiojn. **Limdato la 15a de majo.** C.P. 126, Succursale Beaubien, Montréal (Québec), Kanado H2G 3C8

"Survoje al pontokulturo": Materialoj pri la kosmopolita humanismo (homaranismo). Enhavo: Homaranismo hodiaŭ, Marburga Manifesto, Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj (Unuiĝintaj Nacioj), Deklaracio pri Homaranismo (Zamenhof), Preĝo sub la verda standardo (Zamenhof). Jen la minimumo, kiun ĉiu esperantisto devus scii pri la hodiaŭa homaranismo! Vi ricevos la verkon kontraŭ 4 int. respondkuponoj, de: Homarana Asocio, Bismarckstr. 28, D-3550 Marburg, FR Germanio.

E S P E R A N T I X

ELDONISTO & DISVENDISTO

ĝojas anonci al vi la aperon en la jubilea jaro 1987 de tri novaj bildstriaj albumoj. Tio ebliĝis pro la transformo de ESPERANTIX en entreprenon kun respondeco limigita al la kapitalo de 50 000 FRF (franca s.a.r.l.), la 1987-04-14an (datreveno de la morto de la kreinto de Esperanto, Ludoviko Lazaro ZAMENHOF).



A S T E R I X, L A G R A N D A F O S A Ĵ O

Teksto kaj desegnoj de UDERZO. Traduko de Jopetro DANVY kun kunhelpo de Georgo LAGRANGE (ambaŭ estas membroj de la Franca Esperanto-Instituto). Bindita, 46 paĝoj. Aperos en junio 87, prezo por antaŭmendoj 50 FRF (post la unua de junio: 57,50 FRF). ISBN 2-86497-

Temas pri nova aventuro de Asterix en kiu li, Obelix, Miraklomix kaj la hundeto Idefix devas helpi la maldekstran duonon de vilaĝeto (kiu estas disigita de larĝa fosaĵo) pro tio, ke la dekstra duono petis la helpon de la romianoj....

T I N Ĉ J O, L A N I G R A I N S U L O

Teksto kaj desegnoj de HERGÉ. Traduko de Jopetro DANVY kun kunhelpo de Georgo LAGRANGE. Bindita, 62 paĝoj.Kostos 40 FRF (46 FRF post apero en septembro). ISBN 2-203-01002-

Temas pri nova aventuro de Tinĉjo kaj Miluo, kiuj malhelpataj de Citserono kaj Tsicerono (respektive ronda kaj rekta liphararoj) frontas monfalsistojn.

T I N Ĉ J O, LA KRABO KUN ORAJ PINĈILOJ

Tekstoj kaj desegnoj de HERGÉ. Aperis en decembro 1981 kaj gajnis la unuan premion BILDLIBRO DE LA JARO 1982. 62 paĝoj. Kostas ĝis la unua de junio 37,50 FRF (poste 46 FRF). Atentu, ke ĝi BALDAŬ ELĈERPIĜOS. ISBN 2 203 01001 0

BLAKE & MORTIMER, LA MISTERO DE LA GRANDA PIRAMIDO

Tekstoj kaj desegnoj de Edgar P.JACOBS, Traduko de Joperto DANVY kun kunhelpo de Georgo LAGRANGE. Broŝurita, 62 paĝoj. Kostas 60 FRF (69 FRF post la unua de decembro). ISBN 2-87097-

Temas pri novaj herooj en Esperantujo, kiuj baraktas kontraŭ la kolonelo Orlik en la granda piramido de Keopso. Ĝi estas tiel historie detale, ke ĝi inspiris la nuntempajn arkeologiajn priserĉadojn. La tekstoj estas tiel densaj kaj beletraj, ke estas kvazaŭ literatura verko ilustrita.

Rabatoj & sendokostoj: Mendoj de 10 aŭ pli da ekz. de la supraj (eĉ miksitaj) ricevas 10% da rabato. Ekde 25 ekz. la rabato estos 15%. Por 100 aŭ pli da ekz. la rabato estos 20%. Se vi deziras mendi samtempe 400 aŭ pli da ekz. konsultu nin. La rabatoj estas por unu sama mendo kaj sumeblaj por la sama titolo aĉetita ĉe ni. Vi povas ekz. mendi 20 ekz. de Asterix kaj 5 ekz. de Tinĉjo kaj ricevi minimume 15% sur la totalo. Se vi antaŭe aĉetis ĉe ni 90 ekz. de Tinĉjo, tiam vi ricevas 15% por Asterix sed 20% por Tinĉjo. Vi kompreneble devas antaŭmendi maksimume por havi grandan profiton. ALDONU 15% (minimume 12 FRF) POR SENDOKOSTOJ.

Antaŭmendoj: La prezo por antaŭmendoj validas ĝis la fino de la monato antaŭ tiu de la apero kaj estas tre favora. Poste ĝi estos 15% pli kosta (ni indikis inter parentezoj la finan prezon). Por antaŭmendoj de 25 aŭ pli vi nepre devas pagi minimume duonon antaŭ la limdato.

Mendu tuj, tiamaniere vi helpas nin presigi ilin kaj vi profitas de la favora prezo por antaŭmendoj! Dank'al VI Asterix, Tinĉjo, Blake & Mortimer ne forgesos aŭ eĉ lernos Esperanton!

N.B. Pro komercaj kialoj la nomo de la heroo (kiu estas registrita komercmarko pro la komercaj derivaĵoj) kaj tiuj de liaj amikoj estas skribitaj per ikso ("X") sed la tekstoj estas memkompreneble en fundamenta Eo. Historie tiun literon adoptis romianoj el la greka kiel mallongigon de sia "CS" (prononcita "ks") de kie venas la nomo en Eo. La simbolo "&" estas mezepoka mallongigo por la latina ekvivalento de "kaj", kaj fakte estas "E+t" manskribitaj en unu fojo. ISBN signifas Internacian Sisteman Bibliografian Numeron kaj identigas titolon el eldonzono aŭ lingva grupo, kaj specifan eldoniston ene de tiu zono aŭ grupo.

Ludoviko LAZARO eldonisto & disvendisto

ESPERANTIX SARL, P.O. Kesto 40, 11 rue Frédéric Magisson, 75742 PARIS Cédex 15, FR Francio
Telefono : Int. 33 (1) 4558 4112 ● Poŝtĉekkonto: 2 007.47 J Paris ● Telegramadreso: ESPERANTO-PARIS

Ĉar la nuna ofichavanto foriros ĝis la fino de tiu ĉi jaro, UEA serĉas kandidatojn por la posteno de

Direktor(in)o de la Centra Oficejo

Ni atendas de la dungoto sperton pri oficeja kaj financa administrado, plenan regon de Esperanto kaj vastan konon de la Esperanto-movado, same kiel maturan, diplomatian kaj reprezentan personecon. Kandidatigaj leteroj kun plenaj biografiaj informoj estu adresitaj al Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Se necese, bv. telefoni (010) 436 10 44 (Milojević aŭ Buller).

el la seminario organizita de UEA ĉe Unesko (1985):

PLURILINGUISME ET COMMUNICATION

red. F. Lo Jacomo

Studadon de komunikado oni ne limigu al studado de teknologiaj iloj por diskonigi informojn: jen la ĉeftemo de la 24 aŭtoroj de ĉi tiu verko. kies tekstoj prilumas unuflanke la riĉan kontribuon de lingva diverseco al la homa heredaĵo, aliflanke la gravecon kaj aktualecon de la tiufontaj komunikaj problemoj. 80% franclingva, 20% anglalingva.

Plurlinguisme et communication, red. F. Lo Jacomo. Paris: SELAF, 1986. 330p. 24cm. ISBN 2 85297 194 1. Prezo: 57,00 gld.

Fokuso

Kvaronjara popularscienca magazino

64 paĝoj, 22 × 15,5 cm
Jarabono ĉe UEA 24 gld.

SENPAGA PROVEKZEMPLERO:
HEA-FOKUSO, Pf. 193, H-1368
Budapest, Hungario

Someraj Universitataj Kursoj

organizas Sesion de la 6a ĝis la 18a de julio 1987 en la belega kadro de la Universitato de Lieĝo en Sart-Tilman. 4 temoj antaŭvidataj: lingvistiko, sociologio, stereografio kaj ekologio.

Ĉiu kurso estas semajna kaj ampleksas 12 aŭ 18 lecionojn po 45 minutoj. Eblas partopreni plurajn sekciojn. Loĝado kaj manĝado surloke en la Universitato. Vizitoj kaj kromprogramoj antaŭvidataj. Aliĝu rapide kaj petu informojn al:

José Jacob, Sekretario de S.U.K.,
B.P. 62, Liêge X, BELGIO.

Karlskoga — Svedio

SOMERA POPOL-ALTLERNEJO

Esperanto-kursoj 27/6 — 3/7. Komencantoj kaj progresantoj. (Ankaŭ 8-semajnaj kursoj ekde 31/8.)

Karlskoga folkhögskola
S-691 24 Karlskoga, Svedio — tel. (0586) 548 11

Jugoslavia Esperanto-Ligo Kroatia Esperanto-Ligo Universala Esperanto-Asocio

"100 jaroj de Esperanto-Kulturo"

ZAGREB 2-9 AŬGUSTO 1987

11 TEATRAĴOJ — 8 PUPTEATRAĴOJ — KONCERTOJ DE E-MUZIKO — AMPLEKSA EKSPOZICIO PRI ESPERANTO — ESPERANTO EN TV, FILMO KAJ RADIO — SCIENCA SIMPOZIO — FOIRO DE ESPERANTAĴOJ — VILAĜA FOLKLORA FESTO — MULTAJ EKSKURSEBLECOJ DUM KAJ POST LA ARANĜO

Kial ĝuste prikultura aranĝo okaze de la centjariĝo? Kaj ĉu hazarde en Zagrebo? Ĉu la esenco de nia movado ne estas ĝuste kultura misio realigata per neŭtrala lingvo? Kio ja estas niaj ĉefaj atingaĵoj se ne ĝuste la kulturaj: literaturo, tradukoj, libroj kaj lingvo mem? En kio ja konsistas la ĉefaj celoj de la Movado se ne en lukto por nova kultura ordo en la mondo? Jen la kialoj kiel celebri la centjariĝon guste kulture. La aranĝo "100 jaroj de Esperanto-Kulturo" en Zagrebo tial klopodas prezenti al la partoprenantoj la reprezentan retrospektivon de la kulturaj atin- goj de la Movado en lastaj cent jaroj kaj diverstipajn frandaĵojn kultur-artajn en Esperanto kadre de la riĉa kaj varia programo. Estu certaj ke en Zagrebo regos la etoso hejma por ĉiuj esperantistoj kaj sentiĝos la reeĥoj de nia jam centjara tra dicio. Krome gi estos rekta postkongresa plidetaligo de la Varsovio temo kun aparta akcento je la rolo de Esperanto en pliproksimigado de naciaj kulturoj. La urbo Zagrebo certe kapablos plenumi sian rolon: longjara Esperanto-centro kun pluraj societoj, radio-elsendo, teatra grupo, eldonejo de libroj kaj revuoj kaj miloj da esperantistoj: nepre vizitinda loko por ĉiuj kiuj troviĝas tiumondparte. Ankaŭ vi ne preterlasu la okazon viziti ĝin. La Informa Bulteno kun la detala programo de la Aranĝo, distraj kaj turismaj programoj kaj la aliĝilo, estas senpage havebla ĉe la organizanto:

Kroatia Esperanto-Ligo YU-41000 Zagreb, Amruševa 5/1 Jugoslavio.

Bonvolu atenti, ke ĝis la 31-a de majo 1987 validas speciala rabato por la loĝado.

KUL